

Esperanto
V - 1999/59 (1990)

Bulgara Esperantisto

Februaro 1990



ENHAVO

- 4 La martenica (Milka Nedjalkova)
- 6 Jubileo en Miĥajlovgrad (Mariana Evlogieva)
- 8 Esperanto-movado en Sovetunio (Maria Jankova)
- 10 Interlingvistiko kaj esperantologio (Fritz Wollenberg)
- 13 Lingvaj demandoj (Dimităr Haĝiev)
- 14 Al sukcesa 75-a UK en Havano! (Evgeni Georgiev)
- 16 Beletro (Emiljan Stanev)
- 24 Poezio (Andrej Dementjev, Dragomir Ŝopov)
- 26 Normoj de redakcia politiko kaj etiko (Bernard Golden)
- 28 Amikeco per Esperanto (Boris Gaĝanov, Cvjatko Todorov, Minka Kazakova)
- 31 Kiel propagandi (Nikola Nikolov)
- 32 Deziras korespondi
- III Distroj

Ĉefredaktoro: Maria JANKOVA

Redaktoroj: Evgeni GEORGIEV kaj Rumjana GEORGIEVA

Redakcia konsilantaro: Dimităr HAĜIEV, Krâstju KARUCIN, Kunĉo VĀLEV, Nikola NIKOLOV, Venelin MITEV

Adreso de la redakcio: „Ĥristo Botev“ 97, 1303 Sofio — Bulgario, tel. 22-80-86

Ŝtata presejo „Georgi Dimitrov“ — bul. „Lenin“ 117, 1113 Sofio

Al la kunlaborantoj: Kontribuaĵojn por la koncerna numero ni akceptas du monatojn antaŭe. La materialoj devas esti koncizaj kaj konkretaj, verkitaj nur en Esperanto, tajpitaj aŭ klare skribitaj. Por publikigo sendu bonkvalitajn fotojn. La Redakcio ne resendas manuskriptojn kaj fotojn.

Abonkondiĉoj: En Bulgario „Bulgara Esperantisto“ estas abonebla per la poŝto, kontraŭ 4.80 lv. En ĉiuj sociaŝismaj landoj — per la koncerna poŝto. Por aliaj landoj — pere de UEA aŭ per niaj perantoj, kontraŭ 32 nederlandaj guldenoj aŭ egalvaloro en nacia valuto. La abonprezo por sociaŝismaj landoj en Bulgario estas 7.32 lv., por la ceteraj landoj — 7.80 lv. Prezo de unuopa ekzemplero — 0.50 lv. aŭ 3 ned. gld.

„Bulgara Esperantisto“ havas abonantojn en 51 landoj.

Represo el „BE“ permesata, indiko de la fonto bezonata.

Estas organizita regula surbendigo de „Bulgara Esperantisto“ por la bezonoj de la blindaj esperantistoj.

Sur la unua kovrilpaĝo: Vintro.

Foto: Georgi KAZAKOV

BELGIO

Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijk 140, B—2000 ANTWERPEN

BRITIO

Paul Hewitt, 26 Highfield Road, North Thoresby, Great Grimsby, SOUTH HUMBERSIDE DN36 5RT

FRANCIO

Joseph Barré, 10, Rue du Sénat, F—44300 NANTES

Union Francaise pour l'Esperanto, 4 Bis, Rue de la Cerisaie, F—75004 PARIS

IRLANDO

Esperanto-Asocio de Irlando, 9 Templeogue Wood, DUBLIN 6W

JAPANIO

Yoshiaki Mizuno, Hanazono 1—2418—18, TOKOROZAWA, 359

JUGOSLAVIO

Zoran Murgovski, ul. „Dami Gruev“ 65, YU—96000 OHRID

Niaj perantoj

MEKSIKIO

Leonora Torrez T., Playa Hornos 575, COL. MARTE, 08830 MÉXICO DF

Enrique Lemus, Insurgentes Sur 3493, Villa Olímpica, Edif. 27—001, 14020 MÉXICO DF

PORTUGALIO

Portugala Esperanto-Asocio, R. Dr. João Couto, 6, r/c. A, P — 1500 LISBOA

SVEDIO

Sveda Esperanto-Federacio c/o Lisbet Andreasson, Södra Rörum pl 455, S—242 94 HÖRBY

SVISLANDO

Esperanto-Perantejo, Weingartstr. 21, CH — 3014 BERN

SUD-AFRIKO

C. S. Beckford, P. O. Box. 1227, CAPE TOWN, 8000

USONO

Esperanto League, For North America, Inc. P. O. Box 1129, EL CERRITO, CA, 95430

Jaro 59

N-ro 2

Bulgara Esperantisto

**ORGANO DE BULGARA ESPERANTISTA ASOCIO, FONDITA EN 1919,
DISTINGITA PER ORDENO „KIRIL I METODIJ” — I GRADO**

ANTAŬ LA 42-A KONGRESO DE BEA

Pri niaj sekcioj

Bulgara Esperantista Asocio ĉiam konsideris la sekciojn necesa formo por praktika uzado de Esperanto — laŭ profesioj kaj interesoj. En la nun funkcia asocia statuto (de 1985) la organizado, funkcioj kaj la agado de la sekcioj estas fiksitaj en paragrafoj: 2, 8, 14, 16, 17, 25, 29, 30.

Dum la plenkunsido de BEA je la 16.01.1988 oni serioze atentigis pri la funkcioj de la asociaj sekcioj. La punkto tri de la programo tekstas (p. 12): „Racie uzi la fakajn sekciojn kaj klubojn laŭ profesioj kaj interesoj en la lando kaj en la internacia kunlaborado por esplorado kaj praktikado pere de Esperanto”.

Konsciante la ekskluzivan rolon de sekcioj la Buroo de BEA en sia kunsido la 13-an de novembro 1989 profunde analizis la nunan staton de la asociaj sekcioj kaj multajn proponojn pri pli trafa ilia organizado kaj agado. Kaj tion oni proponas nun por pli vasta pridiskutado flanke de la bulgara esperantistaro.

Estis farita la konkludo, ke estas tre granda diverseco en la organiza stato de la nun ekzistantaj sekcioj, en ilia strukturo, sen difinita aŭ konstanta ligo kun la kluboj, kun la teritoriaj E-

societoj, sen determinita strebo fondi klubojn laŭ profesioj kaj interesoj. Iuj sekcioj sin prezentas nur per estraroj aŭ per unuopa persono, ne ŝanĝitaj multajn jarojn. Ne estas klarigita la organiza strukturo de sekcioj kaj iliaj rilatoj al la teritoriaj societoj, al la E-kulturdomoj.

Laŭ la statuto (statutaj pozicioj), ĝisnuna praktiko kaj nuntempaj postuloj, oni povas antaŭvidi la sekvajn statojn:

Sekcioj laŭ profesioj, interesoj, movadoj ks. fondiĝas ĉe la Centra Estraro de BEA cele al praktika aplikado de Esperanto, enkonduko de Esperanto en difinitan kampon (profesion, hobion, interesojn k. a.), interŝanĝo de informado, sperto ktp.

Ĉi tie ni mencias ankaŭ movadojn ks, ĉar la junulara sekcio, MEM-sekcio, Sekcio pri virina agado ne estas laŭ disvolvo de difinita movado.

Laŭ opinio de la Buroo de CE de BEA oni povas fondi sekciojn ankaŭ, se ne estas koncernaj asocioj ĉe UEA.

Oni fondas sekcion, se estas minimume 30—50 esperantistoj el sama profesio, kun samspecaj interesoj, aŭ adeptoj al difinita movado, unuigitaj en klubojn ĉe la E-societoj.

Oni povas kunvoki konsiliĝon de prezidantoj de sekcioj pri certaj problemoj.

La sekcioj organize estas aliĝintaj al la Komisiono pri Organiza Agado ĉe CE de BEA, al kiu oni raportas minimume foje jare pri iliaj planado kaj agado.

La sekcioj havas estraron el prezidando kaj membroj, elektitan konforme al la akceptita sistemo en BEA. Ne estas devige, ke la estraroj de la sekcioj loĝu en la ĉefurbo.

La membroj de kluboj aŭ iliaj reprezentantoj partoprenas la elektajn konferencojn de sekcioj, kaj la reprezentadon aŭ la partoprenon difinas ĉiu sekcio depende de la nombro de kluboj kaj la aliĝintaj interesiĝintaj esperantistoj.

La sekcioj povas organizi proprajn aŭ kunajn manifestiĝojn de la sekcioj, kiel ankaŭ kun neesperantistaj orgnaizoj, laŭ komunaj problemoj, kiel ankaŭ kun internacia partopreno, en Esperanto aŭ pere de Esperanto; sciencajn, metodikajn, profesiajn ks. konferencojn, iniciatojn ktp., akorde kun la planoj de BEA.

CE de BEA fincas la sekciojn por okazigo de komunaj naciaj elmontriĝoj kaj propagando laŭ prezentita financa plano, konforma al la jarplano de BEA. La sekcio prezentas sian buĝeton por aprobo al CE de BEA post ties akcepto fare de ĝia konferenco aŭ komuna kunveno. Ĉiujare la sekcioj proponas aranĝojn por la kalendara jarplano de BEA.

La sekcio rajtas havi propran financan konton ĉe la ŝtata ŝparkaso, formitan kaj prizorgatan laŭ necesa ordo.

La sekcioj, respektive la kluboj povas ricevi subvenciojn de la CE de BEA, kaj ankaŭ de aliaj personoj, komunumaj, sociaj kaj ŝtataj organizoj.

La financadon de kluboj laŭ intereso, profesioj ks. por lokaj iniciatoj fa-

ras la teritoria societo ĉe la E-kulturdomoj.

La sekcio povas proponi sian reprezentanton por partopreno en la estraro de koncerna internacia E-asocio, inter la plej aktivaj membroj, akorde kun la CE de BEA.

Esperantistoj partoprenantaj laŭ profilo, profesio, intereso, movado ks. en internaciaj manifestiĝoj necesas sekvi la normojn pri konduto kaj inda prezentiĝo kiel reprezentantoj de BEA.

La sekcioj rajtas posedi stampilon, firmofoliojn, kovertojn por korespondado kaj propagandmaterialojn. La sekcioj ne devas havi standardon, rondan stampilon, revizian komisionon.

La esperantistoj laŭ profesioj, intereso, movadoj ks. membras regule en la koncerna teritoria E-societo, al kiu ili pagas membrokotizon, elektas kaj estas elektataj en diversaj E-entreprenejoj, organizoj ktp.

Laŭ intereso, profesioj, movadoj (junulara, virina, MEM, ks.) ĉe koncernaj teritoriaj societoj fondiĝas kluboj laŭ difinita profilo, prefere po unu en loĝloko, se estas minimume 5 esperantistoj kun similaj intereso.

La kluboj estas malfermita sistemo — povas altiri kaj en ilia agado partopreni ankaŭ neesperantistoj, kiuj interesiĝas pri informado pri kaj per Esperanto al koncerna profilo, profesio ktp.

Kluboj laŭ intereso, profesioj ktp. povas formiĝi ĉe apartaj entreprenoj, institucioj, lernejoj, se estas pli da esperantistoj kun similaj profesiaj intereso, celoj ks., akorde kun la koncerna teritoria E-societo.

La kluboj estas rekte subigitaj al la loka teritoria E-societo en organiza rilato. Esperantistoj, kiuj estas solaj en unu loĝloko, rajtas membri organizoj en la plej proksima teritoria E-societo kaj aliĝi al la plej proksima koncerna E-klubo.

Laŭ siaj interesoj la esperantistoj povas aliĝi al kelkaj kluboj, resp. sekcioj, sed necesas manifesti regulan kaj aktivan partoprenon, disciplinon.

La sekcioj resp. la kluboj kiel ankaŭ la apartaj E-societoj rajtas organizi kunajn iniciatojn, ĉefe kiam ili elpaŝas antaŭ neesperantista publiko.

Sendube, la funkcio de la sekcioj resp. de la kluboj laŭ interesoj, profesioj, movadoj ks. devas celi la stabiligon, disvolvon kaj disvastigon de la agado de la teritoriaj E-societoj. Plej sukcese tio realiĝas, kiam oni ĝustatempe kaj celdirekte akordigas siajn funkciajn planojn inter ili mem kaj kun la koncerna E-kulturdomo. Finfine la nuna strukturo de BEA malfermas la eblecojn por dinamika kaj ĝust-

tatempa inkludo kaj resono al la renovigo en diversaj sferoj de nia socia vivo, manifestante elastecon, dinamismon, konsideremon. Tiel ĉe ĉiu konvena okazo oni povas trovi manieron kaj formon informi pri Esperanto per la karaktera por la esperantistoj modesteco kaj aktiveco.

La ĉi-suprajn pripensojn ni konsideras kiel bazajn kaj oni povas ilin riĉigi per novaj ideoj el la praktiko, por la nova Statuto de BEA, akceptota en la 42-a nia nacia E-kongreso. Tiel ili estiĝos gvidilo pri pli aktiva kaj celkonforma apliko de Esperanto en diversaj sferoj de la vivo.

Prof. d-ro Kiril POPOV
Radoslav PARAŠKEVOV

Honore al la 100-jara jubileo de Esperanto-movado en Bulgario kaj la 42a Kongreso de la Bulgara Esperantista Asocio la Literatura Sekcio de BEA anoncas

GRANDAN LITERATURAN KONKURSON

en la jenaj branĉoj:

1. Poezio (originala kaj traduka — de bulgaraj poetoj).
2. Prozo (nur originala — rakonto, raporto, eseo).
3. Dramaturgio (unuakta teatraĵo, skeĉo kaj aliaj malgrandaj formoj).
4. Teksto de kanto (bulgarlingve aŭ en Esperanto).
5. Muziko de Esperanta kanto (teksto publikigita aŭ nova).

La temaro — libera. La verkoj ne devas esti aperigitaj ĝis nun. Ĉiun konkursaĵon oni devas sendi tajpita en 3 ekz. ĝis la 24 de majo 1990 al: Bulgara Esperantista Asocio, bul. Ĥristo Botev 97, 1303 Sofio (por la konkurso). La verkoj devas esti subskribitaj per pseŭdonimo, sed samtempe devas esti kunsendita en aparta koverto la nomo kaj adreso de la sendinto.

La plej bonaj verkoj estos premiitaj kaj publikigitaj en la E-gazetaro. La rezultoj estos anoncitaj en la Kongreso de la Bulgara Esperantista Asocio en Ŝumen (30.VI—1.VII.1990).

IMITINDA INICIATO

La membraro de E-societo „Ĥristo Kozlev” — Polski Trâmbeŝ, unuamente akceptis la decidon de BEA pri vigligo de la societa vivo pere de la kluboj laŭ interesoj. Pli ol 25 membroj posedas person-aŭtojn, eĉ iuj estas profesiaj ŝoforoj. La ideo fondi aŭtomobilistan klubon delonge estas realaĵo.

Dum kelkaj kunvenoj estis klarigitaj la postuloj de BEA kaj de Asocio de Bulgaraj Aŭtomobilistoj (SBA), kies asociitaj membroj ni estiĝas. Ĉeestis ankaŭ loka reprezentanto de

SBA Mladen Tonkov, kiu intertempe estiĝis kursano kaj membro de nia E-societo. Aktive ekagadis la elektita estraro (Jordan Velikov, Asja Ĥristova, Ilija Ivanov) por plenumo de la agadprogramo. La rezultoj ne malfruiĝis.

Neforgeseblaj restos du aŭtomarŝoj, ĉiu kun 20 partoprenantoj: al Rodopi-montaro kaj al Pirina regiono. Centojn da kilometroj tra la lando „flugis” nia esperantista aŭtokolono. La maŝinoj numeritaj laŭ ĉiuj reguloj, ornamitaj per E-flagoj

kaj slogan-rubandoj, altiris la rigardon de la preterpasantoj, informis pri nia nobla ideo...

Dum la tuta aŭto-marŝo regis amikeca etoso, helpemo kaj gaja humoro.

Refreŝiĝinte, ni revenis al niaj devoj, kun firma decido daŭrigi la agadon de nia aŭto-klubo, ĝisfunde utiligi la eblojn, kiujn ofertas SBA, por pliriĉigi la societan vivon kaj elmontri la turistan iniciatemon.

Ĥristo MANOLOV,
Polski Trâmbeŝ

Legendo el vilaĝo Sedjankovci

Raĉo Kovaĉa (bulg. forĝisto), la fondinto de Gabrovo, havis tri filinojn — Bojka, Bojĉidara kaj Irina, kiun lastan tre ofte oni demandis:


*Irina, belega Irina,
Irina, malgranda virgulino,
de kie estas via beleco,
tiu beleco, tiu modesteco,
ke la sunon vi lumigas
kaj la lunon — mallumigas,
la fraŭlojn vi frenezigas
kaj la edziĝintojn vi delogas.*

Multe da fraŭloj aspiris al la beleco kaj al la boneco de Irina. Por antaŭgardi ŝin de malbono, ŝiaj gepatroj translokis ŝin en vilaĝeton Razpopito.

Estis frua, neordinara printempo. Estis la 1-a de marto, la fruktarboj ekburĝonis kaj atendis la sudventon foliigi ilin. La suno delonge degeligi la neĝon sur la herbejoj kaj la heleboro ekfloris kaj ĝojigis la homojn. La bela printempo venigis la cikonojn, kiuj alflugis al niaj lokoj. Ĝoje, Irina ekgvidis la ŝafojn al la proksimaj herbejoj. Ĉirkaŭ ili kuris ŝafidoj kaj sin paŝtis. Irina mem tordis la blankan lanan fadenon, por triki ŝtrumpojn por amato kaj por bogepatroj. Neordinara ĝojo bolis en ŝia brusto rilate al la penso pri Sedjanko, pri la gefianĉiĝo kaj pri la edziĝfesto, pri la nova domo kaj vivo, kiu venis kun la printempo. Ŝi mallaŭte ekkantis:

*Eĉ du tagojn mi malsata estu
eĉ tri tagojn soifa mi vivu
tamen al Sedjanko mi edziniĝos,
ke li konvenas al mia koro,
ke li plaĉas al miaj okuloj,
ke li estas mia ĝoja amato.*

En tiu momento la sudvento venigis cikonion. „Tiu estas la mia!” — ekkriis Irina, kiam ĝi surteriĝis apude. „Bonvenon! Vi lamas, sed transflugis montarojn kaj marojn kaj revenis hejmen”. La cikonio kvazaŭ ekkonis ŝin, ŝi resanigis ĝian rompitan kruron kaj ne lasis ĝin ĉi tie morti pro malvarmo



Grafikaĵo: Anton PETKOV

kaj malsato. Ĝi proksimiĝis al ŝi kaj gaje ekkalkis per sia longa beko, kvazaŭ ĝi volus diri: „Dankon, dankon, mi denove estas ĉe vi. Printempon kaj feliĉon, florojn kaj birdojn mi portas al vi!”

— Kial vi estas sola? — demandis la junulino. — Kie estas via edzino?

La birdo sentime alproksimiĝis al ŝi kaj klinis kapon. Du larmoj aperis ĉe ĝiaj okuloj: „Malproksime, malproksime, la mara ŝtormo dronigis ŝin. Vi helpis al mi kaj mi resaniĝis, sed mi ne povis helpi al ŝi.” La ŝafidoj ĉesis ludi, ĉirkaŭiris la plorantan cikonion kaj aŭskultis, aŭskultis...

Irina konsolis ĝin: „Vi trovos novan edzinon kaj denove revenos en la malnovan neston, ke sen vi ne estas feliĉo. Vi kune kun la printempo alportis al mi mian amatan Sedjankon.”

En tiu momento ekblovis la nordvento kaj alportis al ŝi malbonon. Goran, la amkonkuranto de Sedjanko, eliris el la arbaro.

— Vi ne povas nun forkuri. Aŭ vi konsentu kun mi, aŭ per la tranĉilo mi murdos vin.

La perfortulo kaptis ŝin je la mano kaj ektrenis ŝin al la vilaĝeto.

— Ne, neniukaze! Nur morta vi kondukos min en vian domon!

Irina kontraŭstaris, sed Goran vundis ŝin kaj forkuris. La junulino ploris, ĝemis kaj kriis: „Sedjanko, kie vi estas?” La sango makulis la unuan ŝpinilon, sed la alia ŝpino blankiĝis de larmoj de la junulino. La ŝafoj kaj la cikonio kolektiĝis kaj ploris kun ŝi, sed neniu povis helpi al ŝi.

Ŝi venis al ideo. Ŝi deŝiris fadenojn el la du ŝpiniloj, kuntordis ilin kaj ligis ilin en kolringon ĉirkaŭ la longa kolo de la cikonio: „Iru, iru, mia kara kaj komuniku al mia amato!”

La printempa gasto forflugis kiel sago kaj surflugis la malnovan neston en la domo de Sedjanko.

— Bonvenon! Ĉu kun Avino Marta vi venas? Kion vi portas al mi? Sedjanko rimarkis la kolringon de cikonio. Li komprenis, ke okazis malfeliĉo kun lia amatino. Li iris en la arbaron, trovis ŝin kaj per la kap-tuko ĉirkaŭvolvis la vundon. Li alkondukis ŝin en sian domon kaj ŝi estiĝis lia edzino. La bopatrino prenis la du fadenojn kaj ligis ilin je la vestaĵo de sia filo, ĉar ili savis la vivon de lia amatino kaj alportis al li feliĉon.

De tiam, de la 1-a de marto, ĉiujare la patrino ligis kuntorditajn du fadenojn (blanka kaj ruĝa) je la vestaĵo de sia filo kaj al Irina por sano. Pro tio en nia regiono tiujn fadenojn (martenicojn) oni portas, ĝis kiam oni vidas la unuan cikonion aŭ hirundon.

Avino Marta — la printempo

Milka NEDJALKOVA
Esperantigis: Sonja TIHOVA



„Budapeŝta Informilo” fariĝos ekde la 1-a de januaro 1990 supozeble la plej ofta gazeto de Esperantujo, ja ĝi aperos duonmonate (24 fojojn dum la jaro). Tio signifas, ke ŝanĝiĝos la formato (A/4) kaj ankaŭ la amplekso (8 paĝoj — 80.000 literoj + ilustraĵoj). La plej grava ŝanĝo okazas tamen ĉe la informtransiga rapideco — ja laŭ anticipaj kalkuloj inter la alveno de la informoj ĝis la enmaniĝo ĉe la legantoj pasos entute nur 15 tagoj. La temaro plie internaciigos. Krom la rubrikoj „Korespondi deziras” (foje-foje pli ol 100 adresoj), „Metiejoj de Esperanto”, „Kvin minutoj Esperante”, „Esperanton en la laborejojn” k. a. povas ankaŭ la legantoj lanĉi novajn. Interesigantoj povas turni sin al la Bulgara Poŝto aŭ al la Redakcio de „Budapeŝta Informilo” (Budapest, Pf. 193. H—1368).

JUBILEO EN MIĤAJLOVGRAD

LA OKAZO

La E-movado en Miĥajlovgrad konas kaj periodojn de gloraj sukcesoj, kaj jarojn de stagnado. Antaŭ sep jardekoj tie aperis la unuaj adeptoj de Lingvo Internacia kaj la ideoj de d-ro Esperanto. En la tridekaj jaroj kursojn gvidis la konata esperantisto-veterano Radoslav Triĉkov el Vraca. Sian kulminon la miĥajlovgrada E-movado atingis en la periodo 1958—1968. Tiam Esperanto estis instruata en ĉiuj lernejoj en la urbo, kaj Miĥajlovgrad okupis unuan lokon en la mondo laŭ la nombro de la esperantistoj rilate al la nombro de la loĝantaro. Sed la sukcesoj esprimeblas ne nur per ciferoj; atesto pri ili estas ankaŭ la multaj premioj, kiujn gajnis tieaj esperantistoj (precipe gejunuloj) dum diversaj belartaj revuoj kaj konkursoj en- kaj eksterlande. Post proksimume dekjara stagno, ekde 1981 Esperanto denove enpenetris la lernejojn pere de fakultativa instruado, rondetoj kaj kluboj pri internacia amikeco. Baldaŭ venis ankaŭ novaj sukcesoj en amatoraj konkursoj.

La sepdekjariĝo de la E-movado en Miĥajlovgrad estis la kaŭzo de la okazinta dua taga solenaĵo. Sed societo „Septembra Gloro“ kunvenigis la pli ol 180 samideanojn el 55 loĝlokoj ne por tedi per longaj paroladoj, ne por rememoradi kaj raportadi, ne por laŭdi sin pri iamaj sukcesoj kaj plendi pri neutiligitaj eblecoj. Ĝiaj membroj multe pli interesiĝas pri la nuno, kaj iliaj klopodoj celas al la estanto kaj estonto.

KULTURA PROGRAMO

Verdire, ankaŭ mi estis certagrade surprizita, kvankam mi anticipe estis sufiĉe detale informita pri ĉiuj programeroj. Ne surprizis min la bona organizado — mi ja certis, ke miaj samurbanoj kapablas bone organizi. Ne surprizis min ankaŭ la belarta programo — mi ja sciis, ke en Miĥajlovgrad estas multaj talentuloj. Sed min impresis la bonega etoso kaj la programo kiel harmonia tuto.

Dum la solena kunveno kantis, deklamis kaj dancis profesiuloj kaj amatoroj el Miĥajlovgrad. Partoprenis koruso kun dirigento Dimităr Iliev, kantgrupo „Iskra“ (Faj-

rero), danctrupo ĉe la loka Sindikata Kulturdomo, la aktoroj Emil Mitropolitski, Petko Penĉev, Ĥristo Kuzmov, Stojan Kostov, lernejanaj-esperantistoj k. a.

La gastoj havis eblecon viziti iujn lokajn vidindaĵojn kaj partopreni ekskurson al la monumento „Balova ŝuma“ kaj al la muzeo de la fama bulgara verkisto Ivan Vazov en Berkovica, kie la patriarko de la nova bulgara literaturo loĝis dum kelka tempo.

Sian dankon kaj siajn bondezirojn la gastoj esprimis ne nur per salutvortoj kaj donacoj, sed ankaŭ per spontanea koncerto, dum kiu Bojĉo Mladenov kaj Neli Abaĝieva prezentis proprajn literaturaĵojn, Mariana Elenova kantis ktp.

ĈEFA ATENTOKAPTILO

Fakte, per tio la programo komenciĝis, sed mi ne deziris mencii ĝin pli frue, ĉar ĝi celis ne al la partoprenantoj en la festo, sed al la urba loĝantaro. Pri kio temas? Malalte super la urba placo flugis aviadilo, el kiu eliĝis kolomboj kaj presitaj sur folietoj pensoj pri Esperanto. Ne estis eble preteratention, des pli ke amaso da partoprenantoj en la aranĝo jam staris sur la placo ĉirkaŭ la blovorkestro kaj rigardadis al la ĉielo. Ĉu tio estas bona maniero varbadi por Esperanto? Certe ĝi sola ne sufiĉas, sed mi esperas, ke tio, kune kun la afiŝoj pri Esperanto tra la tuta urbo kaj la aperigitaj en la loka gazeto artikoloj, sukcesis atentigi kaj ekinteresi pri Esperanto la urbanojn. Cetero, pri ilia pozitiva rilato al Esperanto atestas ne nur la gratulskribo, kiun nome de la urba estraro legis Donĉo Nikolov, sed ankaŭ la fakto, ke diversaj institucioj afable kaj senpage disponigis por la aranĝo siajn salonojn.

ANSTATAŬ RESUMO

Por eviti subjektivecon, mi intencis peti diversajn ĉeestantojn pritaksi la aranĝon. Sed mia provo pri intervjuoj fiaskis pro la unuanimeco de la demanditoj. Al mia peto, ke ili diru, kio pleje plaĉis, la respondoj variis inter „Ĉio!“ kaj „Ĉio!!!“, do la opinioj diversis preskaŭ nur rilate al la nombro de la krisignoj. Iu menciis, ke la aranĝo estis

„vera kongreso“. (Laŭ mi, tiu persono ne multe troigis.)

Ĝojigas la pozitiva evoluo de la E-movado en Miĥajlovgrad. Lastatempe societo „Septembra Gloro“ ne tro agemis. Ankaŭ nun ĉefa organizanto estis ties prezidantino Ljubka Metodieva, sed ĉifoje multaj aliaj societanoj vigliĝis kaj volonte helpadis. Tio igas min opinii, ke ĝis nun verŝajne mankis ĉefa aranĝo, kiu ekinteresigu kaj aktivigu la societanojn. Ŝajne ili devas pensi pri ia interesa, stimulgiga — laŭeble tradicia —

aranĝo kun internacia partopreno, kiu estiĝu centro de ilia agado kaj en kiu kuniĝu iliaj klopodoj. Tio povus validi ankaŭ pri aliaj societoj, kiuj deziras plivigligi sian agadon.

Cetere, la titolo „Anstataŭ resumo“ rezultas ne el ekstravagancemo, sed el mia firma konvinkiteco, ke pri miĥajlovgrada E-movado estas malfrue konkludi kaj resumi, ĉar ĝia prospero ankoraŭ antaŭstaras.

Mariana EVLOGIEVA

ESPERANTO-MOVADO EN SOVETUNIO

SERĈANTE SIAN VOJON

Laŭ mia propra sperto mi povas aserti, ke E-movado en kiu ajn lando respegulas la socian vivon. Ja, tio estas normala fenomeno, ĉar nia movado estas malfermita sistemo — en ĝin eniras homoj kun diversaj eduko, klerigo, mondkoncepto, politikaj konvinkoj, aĝo ktp. Ankoraŭfoje la samon mi konstatis estante dek tagojn en Moskvo. Ĉi tie mi ĝuis samideanan, pleje kolegan gastamon de E-familio Aleksandr kaj Elena Ŝevĉenko. Mi kaj mia samredakcianino Mariana Evlogieva partoprenis laboron de Internacia Foiro-Ekspozicio de la Libro, okazinta en la sovetia ĉefurbo en septembro pasintjare. Samtempe ni havis bonan okazon konatiĝi kun pluraj — precipe moskvaj — esperantistoj kaj mem senti la spiriton de la nuntempa tiea E-movado.

Profesie mi estis tre scivolema propraokule vidi ĉion en Sovetunio, pri kio mi aŭdis lastatempe. Sed en tiu raportaĵo mi ne deflankiĝos de la temo pri Esperanto en USSR, ĉar dank' al la libera publikeco ceteraj flankoj de la vivo en tiu lando jam estas konataj.

Do, ĉiuj ŝanĝoj komenciĝis en januaro pasintjare, kiam okazis konferenco de la Asocio de Sovetiaj Esperantistoj (ASE). Rezulte de ĝi ASE estis dissolvita, kaj anstataŭ tiu organizaĵo oni refondis Sovetrespublikaran Esperanto-Unuiĝon (SEU). La kulpigoj kontraŭ ASE estis, ke ĝi konsistis el neesperantistoj, ne servis al la esperantistoj kaj agis pleje sub la gvido kaj laŭ la intereso de la Unuiĝo de Sovetiaj Asocioj por Amikeco kun Eks-

terlando, kies kolektiva membro ASE estis.

Kia estas la stato de la sovetia E-movado unu jaron post tiu akto — la kreo de SEU? Tiu organizaĵo estiĝis membro de UEA. Sed ankaŭ Litovia kaj Latvia E-Asocioj aliĝis al la Universala Esperanto-Asocio. Oni atendas, ke ankaŭ Estonia E-Asocio estos memstara membro de UEA.

Nun al SEU aliĝis ne pli ol

60 kluboj el ĉ. 300 en la lando. En la moskva E-medio ni aŭdis ankaŭ opiniojn tiusencajn: „Neniigante ASE-n, ni mem mortigis nin, ĉar ĝi estis oficiala organizaĵo. Eble ni nur devis ŝanĝi kaj plibonigi ĝian laboron.“ Temas pri tio, ke SEU ne estas oficialigita flanke de la ŝtato kaj neniuj povas diri, kiam tio realiĝos. Pli ofte oni diras, ke SEU ne tre aktivis. La Unuiĝo ankaŭ ne havas sian organon.

„Ŝarĝitaj“ kun similaj opinioj, ni kun intereso vizitis la redakcion de ĵurnalo „Moskvaj Novaĵoj“, kie la multjara esperantisto kaj eksvicprezidanto de ASE Vladimir Samodaj — prezidanto de SEU, laboras kiel estro de la araba fako.

— Vladimir Samodaj, pro kiaj kialoj oni refondis SEU-n? Ja, tiu organizaĵo estis severa en la pasinteco.

— La ideo pri refondo de SEU naskiĝis tute spontane

en la E-konferenco de ASE. Tiam ni ne havis sufiĉe da tempo por bone pristudi ĝian historion. Tiam ni decidis, ke la ŝtato pli facile apogus la jam ekzistantan organizon kiel SEU, ol subteni la kreadon de nova. Krom tio, la nuna SEU funkcias ĉe aliaj historiaj kondiĉoj. Ankaŭ la homoj estas aliaj. Pro tio ni evitos la iamajn eraĵojn.

— La bazaj punktoj en la agado de SEU?

— Ni ĵus naskiĝis kaj nia unua tasko estas organizi en Moskvo la eldonadon de informforma bulteno, per kiu ni havos eblecon organizi pli

amase kaj publike nian agadon. Ni intencas ankaŭ krei entreprenon, kiu finance helpos al ni. Ni esperas, ke SEU estiĝos vera tutlanda E-organizaĵo, oficialigita de la ŝtato, pri kio nun oni atendas novan leĝon...

— Sed iuj E-asocioj de via lando jam aliĝis memstare al UEA?

— Jes, UEA akceptis tiun aliĝon, ĉar tiuj asocioj estis ĝiaj membroj antaŭ la milito, t. e. antaŭ ol la respublikoj aliĝu al USSR. UEA akceptis ilin kondiĉe, ke ili neniam estiĝu membroj de SEU.

Ni deziras kunlabori kun ĉiuj E-asocioj kaj esperantistoj en la mondo, kiuj de nia

vidpunkto ne estas reakciaj, t. e. kiuj ne deziras regi super la aliaj, kiuj ne estas kontraŭ la nacioj, religioj, demokratiaj ideoj. Ni ne akceptas la faŝismon, naciismon kaj ŝovinismon.

Kun Bulgara Esperantista Asocio ni deziras intime kunlabori, interŝanĝi librojn, gazetojn, turistajn grupojn ktp.

— Ĉu ni legos ankaŭ estonte „Moskvaj-n Novaĵoj-n” en Esperanto?

— Eble ne plu, ĉar la rezulto de la farita eksperimento estis financa malsukceso.

* * *

Krom la Redakcio de „MN” ni vizitis ankaŭ E-klubojn, ĉeestis la jarkunvenon de klubo „Lev Tolstoj” — unu el la plej popularaj kaj viglaj en Moskvo. Impresis nin la amikaj rilatoj inter ĝiaj membroj, la E-kantoj de Miĥail Povorin, la iniciato kolekti ĉiujn esperantlingvajn tradukojn de Tolstoj-verkoj kaj transdoni ilin al la muzeo.

Gastante ĉe la E-klubo ĉe la Kulturdomo de la laboristoj en uzino pri kaŭĉuko, gvidata de Elena Ŝevĉenko, ni eksciis pri la organizita

printempe Centra Rusia Regiona Esperantista Renkontiĝo, en kiu partoprenis pli ol 100 esperantistoj. Dum ĝi estis organizitaj lingvaj kursoj, prelegoj pri la Esperanto-movado ktp. Dum tiu nia vizito, farita kun la angla esperantisto Don Gasper, oni pridiskutis la eldonagadon de BEA kaj la revuon „Bulgara Esperantisto”, kiu havas en Sovetunio milojn da legantoj.

Antaŭ nia forveturo ni renkontiĝis kun Nataŝa Ŝoroĥova, kiu gvidas la E-

klubon ĉe la Unuiĝo de Sovetiaj Asocioj por Amikeco kun Eksterlando kaj estas membro de la Fondaĵo de Esperantistaj Junularaj Aranĝoj (FEJA). Tiu organizaĵo okupiĝas pri E-turismo kaj komerco per Esperanto-literaturo. Interesa estas ŝia opinio pri la nuntempa E-movado en Sovetunio. Laŭ ŝi ĉiu soveta respubliko devas havi sian E-Asocion kaj ekzistu Tutlanda Konsilantaro de la gvidantoj de ĉiuj Esperanto-Asocioj, kiu havos nur kunordigajn funkciojn, sed ne gvidajn.

* * *

... Ni lasu al la sovetiaj esperantistoj ordigi sian propran Esperanto-domon. Ĉu estos SEU aŭ Konsilantaro, aŭ la ekzistanta nun Tutsovetia Unuiĝo de E-Kluboj (malpopulara, sed oficialigita fare de la ŝtato) — tion decidos la bezonoj esperantistaj. Finfine mi nur aldonos, ke en sovetia E-movado pasas proceso de serĉado de la vera vojo. La ŝanĝoj en la movado esprimas la demokratiigon en ĉiuj sociaj sferoj kaj dumtempe ĉio trovos sian lokon.

Maria JANKOVA



Sovetiaj esperantistoj agadas

SUKCESA KONCERTO

Laŭ iniciato de la nevidanta esperantisto Julian Vovk — ĉefa belarta gvidanto de la Kulturklubo de la nevidantoj en u. Lvov (USSR), inter la kolektivoj de la nevidantoj en Lvov kaj Plovdiv estiĝis amikaj rilatoj. En junio pasintjare 91 plovdivanoj vizitis Lvov. Oktobre 93 personoj el Lvov gastis en Plovdiv. La grupo konsistis el du amatoraj kantensembloj: koruso de banduristoj „Karpati“ kaj virina kantgrupo „Strumoček“ (Rivereto).

Post la koncerto de la plovdiva E-kantgrupo en Lvov Julian Vovk decidis

inkluzivi en la repertuaron de „Strumoček“ E-kantojn. Nur por monato la grupo kaj ĝiaj solistoj preparis 13 E-kantojn kaj inter ili 3 bulgarian: „Hej, Balkan“, „Ruĝa papavo“ kaj „Ludu harmoniko“.

La 4-an de oktobro vespere en la domo de E-kulturo — Plovdiv, la gastoj prezentis koncerton. Esperante kaj ukraine sonis emociaj kantoj. Antaŭ publiko la grupo esperante kantis unuafonje, tamen la plenumo estis mirinda — tre altkvalita kantado kaj E-prononcado, kvankam la anoj de la grupo ne estas esperantistoj. Sed

multaj el ili deziras lerni la Internacian Lingvon.

Multe da esperantistoj kaj neesperantistoj ĉeestis. Ĉiu kanto estis longe kaj elkore aplaŭdata. Post la koncerto en la junulara E-kafejo okazis amika renkontiĝo. Oni enmanigis al Julian Vovk honoran diplomon en la nomo de E-kulturdomo — Plovdiv.

Ni bondeziras al niaj Lvovaj amikoj novajn sukcesojn ankaŭ en E-artaktivado.

Vladimir JELEV

banduro — ukraina popolmuzika kordinstrumento.

Grava kontribuo al la moderna Zamenhof-bildo

*PRI LA KLOPODOJ DE CANKO MURGIN MODERNIGI LA ZAMENHOF- BILDON LAŬ LA
BEZONO DE LA INTERNACIA PACMOVADO*

Fritz WOLLENBERG

(Daŭrigo de n-ro 1/90)

SERĈADO DE RACIAJ GRAJNETOJ

Murgin mem priskribas sian esplorlaboron kiel serĉadon de raciaj grajnetoj en la Zamenhof-ideologio kelkloke ekzistantaj inter la amasega balasto.¹⁹ Pri la sukceso de tiu entrepreno ne nur decidis lia klara celo kaj progresema aktuala motivigo. La uzitaj metodoj grave influis la rezulton. Murgin analizas kaj provas priskribi la evoluon de gravaj ideoj ĉe Zamenhof kun ĝiaj kontraŭdireco kaj diverstendencaj efikoj. Li ekzemple difinas la internan ideon kiel „specon de ideologio en la E-movado”, kiun „Zamenhof derivis el la internacilingva ideo”, supozanta, ke „paralele kun la vastigado de Esperanto en la internacia sfero el ĉiu interkonsiliĝo kreskos firma interkonsentiĝo fare de la nacioj kaj ŝtatoj”, kies efekto „estos malebligo de militoj kaj stariĝo de eterna paco en la internacia vivo”.²⁰ Murgin montras, ke la pacifisma idealo pri la unuiĝo de la homaro per komuna planlingvo jam aperas en la Zamenhofa praesperanta himno de 1878, poste reaperas en la poemo „La Espero” (1891) kaj havis koheran funkcion „en daŭro de dekelkaj jaroj dum la E-movado estis miniatura”.²¹ Fundamentan revizion de la Zamenhofa starpunkto Murgin konstatas pri la jaro 1895, priskribante ĝin kiel sekvon de la Zamenhofa ekdubo pri la pozitiva efekto el la paciga efiko de la E-funkciado. El la Zamenhof-citaĵo: „... la Lingvo Internacia per si mem certe ne volas altrudi al la homoj tian unuiĝon” (1900) li konkludas reduktion pri la rolo de Internacia Lingvo. Pri la jaro 1905 Murgin konstatas revenon de Zamenhof al la unua koncepto kaj pri la lastaj dek jaroj de la Zamenhofa vivo denove nur la traktadon de Esperanto kiel rime-

do. Ekzemplodona estas konsekvenca prezento de la evoluo kaj kontraŭdireco de Zamenhofaj ideoj rilate al la ĝenerala historio, al la tiutempa historio en Rusio kaj Pollando kaj al la historio de la Esperanto-movado. Murgin ekzemple elstarigas la influon de la revoluciaj eventoj en Rusio (1905—07) al Zamenhof kaj ties ideoj. Li prilumas rilatojn de esperantistaj gvidantoj al Zamenhof por priskribi la esencon de la interna ideo en ĝia dua stadio (1906—1912). Li karakterizas tiun „renovigitan internan ideon” kiel daŭrigitan „tradician esperantistan pacifismon”,²² kiel eblecon por Zamenhof „propagandi la esencon de la homaranismo sub la flago de la pli akceptebla kaj pli konata interna ideo”,²³ kaj trie kiel „ŝelon sen enhavo” aŭ „sakon plenŝtopitan per balasto” do eblecon, kolekti „ĉiujn ismojn fakte aŭ ŝajne ligitajn al Esperanto kaj al la Esperanto-movado sub la flago de la interna ideo”,²⁴ Murgin ne haltas ĉe karakterizo, sed ankaŭ entreprenas la provon montri ĝeneralajn politikajn sekvojn kaj kontraŭdirajn efikojn en la E-movado. Kaj la „naskiĝo de la pacideo inter la esperantistoj... la pozitiva rolo en tute sporadaj kazoj de konkreta kaj socie utila aplikado de la esperantista pacifismo...”, la karakterizo de la E-movado kune kun sia interna ideo (esperantista pacifismo)... ĝis la jaro 1905” kiel „unu el la internaciaj movadoj kun progresema tendenco en sia disvolvo” kaj la „politike anakronisma kaj ideologie misgvida esperantista pacifismo reaperinta en la epoko de kontraŭimperiismaj revolucioj”²⁵ dialektike estas konstatitaj en la Murgina analizo. Tia maniero de prezento eblas, ĉar por Murgin la spirita evoluo de Zamenhof tiutempe estas „esplorproceso dum la serĉado de konvena ideologio por la E-movado.”²⁶ Por ricevi aktualajn

konkludojn Murgin esploras la sorton de Zamenhofaj ideoj en la E-movado post la morto de Zamenhof. Li raportas pri degenero de la Pacifisma E-Organizo, pri la manovro de Olšovanger substitui la „aktuale brulantan problemon“ paco — militarismo“ per flanka, jam malnoviĝinta kaj ne tiom aktuala problemo „homo — dio“ (1926),²⁷ pri la alarmo de Demidjuk „pri la erara maniero de traktado rilate al la interna ideo“. Per la atentigo pri la procedo de ioma post ioma substituo“ de esperantista pacifismo... per aktiva pacdefendo, per la konkreta batalo kontraŭ la faŝismaj kaj imperiismaj fortoj“ antaŭ la Dua Mondmilito²⁸ Murgin konsciigas progreseman tradicion, per la atentigo pri la klopodo de politikaj reakciuloj post la Dua Mondmilito mise kaj fuŝe traktadi la internan ideon li konsciigas regresan tradicion de la nodo al Zamenhofaj ideoj.²⁹ Por kompreno de la Zamenhofa mondkoncepto kaj ties evoluo kaj efikado gravas malkaŝi la fontojn. Murgin montras kelkajn fontojn de Zamenhofaj pensoj kaj prezentas, kiamaniere Zamenhofaj pensoj mem estiĝis fontoj por nuntempaj klopodoj elstarante la humanisman tradiciolinion. La broŝuro komenciĝas per indiko pri Rene Decartes, kiu „el scienc-filozofia vidpunkto... unue formulis“ la ideon „pri starigo de planlingvo en la sfero de internaciaj kaj interŝtataj rilatoj“.³⁰ La plej grandaj E-organizoj hodiaŭ Murgin karakterizas jene: „La unuigita UEA gvidas la internacian E-movadon... La ĉefa tasko de UEA estas la realigo de la internacilingva ideo per starigo de planlingvo, kia estas la Lingvo Internacia (Esperanto), en la internaciaj kaj interŝtataj rilatoj en monda skalo.“³¹ „En la personeco de MEM kaj ties presorgano — la internacia E-gazeto „Paco“ — la pacstreba testamento de d-ro L. L. Zamenhof trovisian plej nelacigeblan realiganton kaj perfektiganton.“³²

Murgin plenumas, kion li promesas en la antaŭparolo. Li ankaŭ penas kontribui al moderna Zamenhof-bildo per reveno al ignoritaj faktoj. Li direktas la atenton de la leganto ekzemple al interesaj dokumentoj kiel leteron de la „revolucia esperantisto“ d-ro Asnes³³ al la prezidanto de la lingva komitato profesoro E. Boirac kaj leteron de la unua esperantista socialdemokrato en Bulgario Penko Petrov al Doktoro Zamenhof³⁴ por malkaŝi eblajn influojn el re-

volucia movado al Zamenhof. La vizion de Zamenhof pri estonta homa socio deklarita en 1907 en la Guildhall de Londono Murgin pritraktas kiel de aliaj Zamenhof-historiografoj ne sufiĉe atentita socia platformo de Zamenhof post Hilelismo (1901) kaj Homaranismo (1906). Laŭ li specialan signifon jenaj vortoj akiras per ĝiaj civila karaktero (kontraŭe al la du aliaj religiprin cipaj platformoj) kaj optimismo: „Longe daŭros ankoraŭ malluma nokto sur la tero, sed ne eterne ĝi daŭros. Venos iam la tempo, kiam la homoj ĉesos esti lupoj unuj kontraŭ aliaj. Anstataŭ konstante batali inter si, elŝiri la patrujojn unuj al la aliaj, perforte altrudadi al si reciproke siajn lingvojn kaj morojn, ili vivos inter si pace kaj frate, en plena interkonsento ili laboros sur la tero, sur kiu ili vivas...“.³⁵ Se Murgin nun elstarigas la lastan frazon de tiu vizio, en kiu Zamenhof esprimis la esperon, ke la esperantistoj realigu ĝin, li ricevas mezurilon por la agado de la esperantistoj en la spirito de Zamenhof. Jam rilate al la interna ideo Murgin elmontris la kontraŭdiron inter la celo kaj vojo ĉe Zamenhof. Li karakterizis ĝin paralogismo, kies „intenco estas bonega, sed li sin direktas laŭ vojo ne kondukanta al realigo de la noble starigita celo.“³⁶ Tiun kontraŭdiron ankaŭ enhavas la supra citaĵo. Ĝi troigas la rolon de la esperantistoj tiurilate. Tamen restas la ĉefa mezurilo por agado en Zamenhof-spirito, la kontribuo al la realigo de liaj noblaj idealoj. Murgin konstatas „novan tendencon“ en la Zamenhofa pensado, nome ekkonsciigon pri la ĝustaj fortoj, pri la ĝusta vojo por realigi la vizion.

TROVO DE SOCIALISMAJ GRAJNETOJ?

Vere la vizio de 1907 desegnas bildon de nova socio. Konvinke Murgin povas priskribi raciajn grajnetojn en la Zamenhof-ideologio. Mi ankaŭ devas agnoski lian aserton de nova tendenco en la disvolvo de tiu ideologio. Sed la enhavon de tiu ĉi nova tendenco mi ne povas kompreni en la de Murgin klarigita senco kiel kaŝa socialismo. Konvinke Murgin atentigas pri influoj de la kontraŭimperiisma revolucio en Rusio (1905—07) al Zamenhof. Tamen tiu ĉi ne forlasas la pozicion de burĝa demokratio. Li sin rigardis staranta en la tradicio de la „granda revolucio“ en Francio,

„kiu la unua proklamis la rajtojn de homo“.³⁷ La rilato al Lenin kaj la laborista klaso estis tia de aliancano pro la samaj malamikoj: militarismo, ŝovinismo, rasismo, imperiismo. Lia rilato al la laborista klaso estas tia, ke li konsciigis pri la demokrataj tradicioj de tiu ĉi klaso.³⁸ Influan de Marx kaj Engels Murgin asertas, sed ne pravas. Tute certe Zamenhof ne estis protagonisto de la socialismo, sed estiĝis aliancano de tiuj fortoj, kiuj estis la protagonistoj. Tamen Murgin pravas, ke en tiu socio efektiviĝas la idealoj de Zamenhof. La nova tendenco ĉe Zamenhof estis plirealismiĝo de sociaj ideoj. De la pozicio de burĝa demokrato li kritikis la imperiismon kaj ties malhumanismajn tendencojn serĉante elirvojn. Kontraŭimperiisman tendencon Murgin ankaŭ povas pravi en kontribuoj pri la evo-

lucio de Zamenhofaj kunlaborantoj. Ni sciiĝas pri Alfred Thonney, Julio Mangada Rosenörn kaj pri Felikso Zamenhof.

DAŬRIGU LA LABORON!

Memkompreneble mi ne povis prezenti la tutan enhavoriĉon de la Murgina broŝuro. Mi nur volis skizi, kiamaniere la konata bulgara aŭtoro kontribuas al moderna Zamenhof-bildo konvena al nuntempaj bezonoj. Spite la troigojn de ideologia proksimeco al socialismo Murgin kapablas trafe karakterizi la disvolvon de Zamenhofaj ideoj kaj montri la historian personecon de la fondinto de Esperanto. Laŭ la ekzemplodonaj metodoj de Murgin necesas plua esplorkomenco. La studoj de Murgin estas es-

LITERATURO KAJ FONTOJ

- | | |
|------------------|------------------|
| 19. PM, p. 15 | 27. PM, p. 22 |
| 20. PM, p. 11 | 28. PM, p. 24 |
| 21. PM, p. 12/13 | 29. PM, p. 25 |
| 22. PM, p. 19 | 30. PM, p. 5 |
| 23. PM, p. 21 | 31. PM, p. 45 |
| 24. PM, p. 21/22 | 32. PM, p. 25 |
| 25. PM, p. 19 | 33. PM, p. 30/31 |
| 26. PM, p. 21 | 34. PM, p. 31/32 |

35. OV, p. 383
 36. PM, p. 14
 37. L. Zamenhof, *Letero al D-ro Javal* 9/IV, 06. En: „*La Nica Literatura Revuo*“, 4, Nr. 23, 5/1959
 38. *Komparu: Fritz Wollenberg, La realismo de revulo. En GDR-el-dono de „Paco“ 1985*

ALVOKO

NOVA ESPERANTA ARBARETO

La esperantistoj estas homoj, kiuj batalas ne nur por paco kaj interkompreniĝo inter la popoloj, sed ankaŭ por paco kun la naturo. Ilia naturdefenda agado aktiviĝis post la okazigo de „Ekoforumo'89“ en Sofio.

En sia kunveno esperantistoj el E-societo „D-ro Stojan Vasilev“ — komunumo „Krasno selo“, akceptis la proponon de inĝ. Janko Lalov, ke ĉiu esperantisto plantu minimume po 5 arbojn. La societo alvokas ĉiujn esperantistojn en la lando sekvi ties ekzemplon, por ke tio fariĝu tutpopola agado.

La 19-an de novembro 1989, helpe de Direkcio de Nacia Parko „Vitoŝa“, la esperantistoj el la societo faris forstan laborbrigadon en loko „Planineca“. Malgraŭ la malvarma vetero, ĉiuj laboris kun granda entuziasmo kaj plantis 200 pinetojn. Ĉiuj brigadanoj elmontris deziron en la printempo de 1990 denove organizi brigadon por buti la pinetojn, kaj ankaŭ forstumi la ceteran parton de la loko. Oni nomis ĝin „Esperanta arbareto“.

Petrana Lalova

PRI LA VORTFARADO

● ĈU PROJEKTOPLANO AŬ PLANPROJEKTO?

La influo de la gepatra lingvo ĉe la lernado kaj uzado de fremdaj lingvoj estas ege forta precipe en la komencaj etapoj de la lernado. Ĝi tuŝas ĉiujn partojn de la lingvo — fonetikon, morfologion, frazon, sintakson, leksikon. Ofte ĝi ne estas konsciata de la lernanto kaj uzanto de la fremda lingvo.

Tie ĉi mi montros la influon de bulgara lingvo sur la vortfaradon en Esperanto kaj speciale sur la formadon de la kunmetaĵoj, unu elemento el kiuj estas la vorto „projekto” kaj la cetera unu el la vortoj **plano, programo, rezolucio, decido, buĝeto, statuto, kontrakto, kalkulo** k. a. La eraroj ĉe la formado de tiuj kunmetaĵoj abundas. La eraroj konsistas en tio, ke la kunmetaĵoj estas formitaj laŭ la maniero de formado de kunmetaĵoj en la bulgara lingvo: **projektoplano, projektoprogramo, projektodecido, projektobuĝeto, projektostatuto, projektokontrakto, projektokalkulo** k. a. Tia eraro estas allasita ankaŭ en n-ro 6/1989 de „Bulgara Esperantisto” (p. 28) en la informo „En la Buroo de CE de BEA” de E. G. Tie estas uzita la kunmetaĵo **projektoplano**.

Laŭ la reguloj en Esperanto la ĉefparto de la kunmetaĵo, kiu en nia okazo estas la vorto „projekto”, staras en la fino de la kunmetaĵo kaj fiksas la gramatikan vortkarakteron kaj la ĉefan sencon de la kunmetaĵo. Ĝi estas nomata ĉefelemento. La antaŭa elemento, kiu en nia ekzemplo estas la vorto „plano”, servas nur por karakterizo de la ĉefelemento. Ĝi estas nomata flankelemento.

Se ni analizos la kunmetaĵon **projektoplano**, ĝi estos klarigebla jene: plano de

projekto. Do, la kunmetaĵo **projektoplano** havas sencon tute malsaman de la senco, kiun la aŭtoro de la informo intencis enmeti en ĝin, nome: projekto de plano. Tial la kunmetaĵo devas esti „planprojekto”.

Analizite laŭ la sama maniero la ceteraj menciitaj kunmetaĵoj estas analizeblaj jene: **projektoprogramo** — **programo de projekto, projektodecido** — **decido pri projekto, projektobuĝeto** — **buĝeto de projekto, projektostatuto** — **statuto de projekto, projektokontrakto** — **kontrakto pri projekto, projektokalkulo** — **kalkulo de projekto**. Do, tiuj ĉi kunmetaĵoj ne esprimas la signifojn de la bulgaraj kunmetaĵoj *proektoprograma, proektoreŝenie, proektobjuĝet, proektostatut, proektodogovor, proektosmetka*, sed ili havas sencon. La signifoj de tiuj bulgaraj kunmetaĵoj esprimigas ĝuste en Esperanto: **programprojekto, decidprojekto, buĝetprojekto, statutprojekto, kontraktprojekto, kalkulprojekto**. En bulgara lingvo estas kunmetaĵo *zakonoproekt* (leĝprojekto), kiu estas formita sammaniere kiel en Esperanto, sed ekzistas alia kunmetaĵo pri la sama nocio *proektozakon*, kiu estas formita alimaniere. Ankaŭ ĝi devas esti tradukita **leĝprojekto**, sed ne **projektoleĝo**. Tie ĉi gravas la logiko, ne la maniero de la formado de la kunmetaĵo.

Sed kiel eviti la influon de la gepatra lingvo sur Esperanton? Laŭ mi la respondo devas esti: per profunda studo de gramatiko de Esperanto, kiu ebligas al la studanto penetri en la spiriton de la lingvo.

Dimităr HAĜIEV

Al sukcesa 75-a UK en Havano!

Antaŭ du jaroj Universala E-Asocio akceptis la kandidatecon de kuba ĉefurbo Havano esti gastiganto de la 75-a Universala Kongreso de Esperanto, kiu okazos de la 14-a ĝis la 21-a de julio j. k. Konekse al tio **Evgeni Georgiev**, reprezentanto de revuo „Bulgara Esperantisto” renkontiĝis enkadre de la UK en Brajtono kun la prezidanto de Loka Kongresa Komitato **Jesús A. Castillo Jiménez**, ankaŭ prezidanto de Kuba E-Asocio, kaj interparolis kun li.



**75-a UNIVERSALA
KONGRESO
DE ESPERANTO**
14-a – 21-a julio 1990
Havano, Kubo

— La elekto de Havano kiel gastiganto de la 75-a Universala Kongreso certe estas merita rekonno pro la sukcesa disvastigo de la Internacia Lingvo en Kubo dum la lasta jardeko. Kiujn pli grandajn atingojn de KEA vi mencias?

— Unua E-societo en Kubo ekestis jam en 1907, sed veran komencon de la E-movado markis la fondita en 1979 Kuba E-Asocio. Ĝi estis kolektiva membro de UEA en 1983. KEA estas protektata kaj helpata de landa Akademio de Sciencoj kaj de aliaj sociaj instancoj. La Asocio unuigas 1300 membrojn en 10 el la 14

provincoj en la lando kun mezaĝo 27 jaroj, kio estas multpromesa garantiaĵo por sukcesa evoluo de la kuba E-movado.


Grandan sukceson atingis la instruado de Esperanto. En 1989 60 kursgvidantoj instruis la Internacian Lingvon al 1300 plenaĝaj gekursanoj (kompare kun 163 gekursanoj en 1979) en 29 lernejoj. Pasintjare oni komencis instrui Esperanton ankaŭ al infanoj.

Rezulte de kreskanta interesiĝo pri Esperanto en kaj eksterlande en 1988 Radio Havano komencis elsendi foje semajne 20-minutajn programojn en la Internacia Lingvo destinitajn por Ameriko, Azio kaj Eŭropo.

Fremdlingva Eldonejo „José Martí” — Havano, klopodas realigi vastan eldonadon de E-libroj. Ĉi-momente oni preparas por presigo novajn eldonaĵojn, kiuj viciĝos apud la jam aperintaj kvar libroj — „La historio absolvos min” de F. Castro, „Kuba ŝtata organizo” de D. Kardenas, romano „La lasta virino” de M. Kofinjo kaj „Kvin rakontoj” de J. Martí. La organizantoj de la 75-a UK planas oferti al la gekongresanoj dekon da diversaj kubaj E-eldonaĵoj.

— Kiel iras la preparlaboroj por la 75-a Universala Kongreso?

— La preparo de la 75-a UK iras kontentige. Mi povas komuniki, ke ni jam solvis tri gravajn problemojn — subskribo de kontrakto inter Cuba Tour kaj UEA pri loĝado, ekskursoj, manĝoj kaj transportado de kongresanoj, subskribo de kontrakto pri luo de Kongresa Palaco — Havano, certigo de flugoj pere de oficiala flugkompanio Asociación Cubana Aviación. Alia nia atingo estas, ke Alta Protektanto de



Vidajo de Havano

la Kongreso estiĝis d-ro Carlos Rafael Rodriguez, vicprezidanto de Kubo — tio donas grandan avantaĝon al LKK, ĉar ni ricevis fortan subtenon de la kuba registaro por prepari la Kongreson. Prezidanto de la Honora Komitato estiĝis d-ro Armando Hart Davalos — ministro pri kulturo de Kubo.

— **Kion vi antaŭvidas en la kultura programo de la Kongreso?**

— Ni serĉas apogon de diversaj landaj asocioj de Latin-Ameriko ĉe la kunmeto de la kultura programo. LKK preferas, ke ĝi estu latinamerika kaj la venintaj kongresanoj el Eŭropo kaj aliaj kontinentoj ĝuu niajn komunajn tradiciojn. Ankaŭ ni pretas aranĝi fakajn vizitojn kaj sportajn programejojn.

— **Ĉu en Kubo okazos aliaj E-kongresoj aŭ konferencoj?**

— Jes. Jam estas reguligitaj ĉiuj formalaj aferoj rilate la okazigon de Infana Kongreseto. Ni jam kontaktis kun la Organizo de Junpioniroj en Kubo kaj ĝi disponigas al ni senpage sian sidejon — Urbo de la Junpioniroj „José Martí“. La Urbo ĉiujare gastigas pli ol 12 000 geknabojn. Ĝi havas tre bonajn kondiĉojn — amuzejojn, sportejojn kaj ĉion necesan, por ke la infanoj ne enu dum sia Kongreseto. Ankaŭ ni antaŭvidas diversajn ekskursojn kaj eble viziton al in-

ternacia kampadejo, kiu okazas ĉiujare en la plaĝo „Varadero“.

La 46-a Internacia Junulara Kongreso de TEJO okazos en Playa Girón — de la 22-a ĝis la 29-a de julio k. j.

— **Ĉu vi planas konkretajn paŝojn por prizorgo de la kongresanoj?**

— Jes. Nun ni pretigas pli ol 200 kubajn esperantistojn por deĵori dum la 75-a UK. Ni strebas eviti la plej gravajn mankojn de almenaŭ la tri lastaj kongresoj de UEA. Unu el tiuj malperfektaĵoj estis, ke la unua renkontiĝo de kongresanoj, alvenintaj sur flughaveno aŭ stacidomo kaj ne trovintaj esperantistojn tie, fariĝas iom ĝena. En Kubo tio certe ne okazos, ĉar ekde la komenco, ankoraŭ en la aviadilo mem, la veturantaj kongresanoj povas aŭskulti nian lingvon Esperanto kaj informiĝi antaŭ ol atingi la havanan flughavenon. Tie estos amaso da deĵorantoj, kiuj gvidos ilin ĝis la koncernaj hoteloj kaj loĝejoj.

Rilate la ricevon de vizitoj, la kuba registaro pretas doni vizon al civitanoj el ĉiuj landoj de la mondo. Ni ne antaŭvidas problemojn tiurilate.

— **Kiel oni povas aliĝi al la Kongreso?**

— Pri aliĝo al la 75-a UK esperantistoj kontaktu siajn landajn E-asociojn, perantojn de UEA aŭ E-vojaĝoficejojn. Tie oni ricevos ankaŭ



Ĉe la bordo de Atlantika Oceano.

informojn pri loĝigo, manĝoj kaj transportado. Kontraŭ sumo en la koncerna valuto oni ricevos en Kubo kreditbiletojn, per kiuj oni povas manĝi en diversaj restoracioj, ludi hotelĉambron, takson ktp.

— **Ĉu „Bulgara Esperantisto“ estas konata en via lando?**

— La revuo estas ricevata kaj multe legata de kubaj esperantistoj. Ankaŭ mi regule legas ĝin. Lastatempe min allogas ties bela ekstera aspekto, pli oportuna formato kaj pli riĉa kaj varia enhavo kun multaj trafaj ilustraĵoj. Mi bondeziras pluajn sukcesojn al la Redakcio de „Bulgara Esperantisto“, en ĝiaj streboj krei bonkvalitan kaj vaste legatan revuon en tuta mondo.

MIRINDA ANIMKONANTO

Emilijan Stanev (1907—1979) estas unu el la plej ofte tradukataj en fremdajn lingvojn moderna bulgara verkisto. Jam estis publikigitaj en la revuoj „Bulgara Esperantisto” kaj „Nuntempa Bulgario”, kaj ankaŭ en la antologioj „Bulgara prozo” kaj „Septembro estiĝos majo” E-tradukoj de liaj rakontoj; antaŭ kelkaj jaroj aperis lia novelo „Ŝtelisto de persikoj” kaj nun en Sofio oni preparas por presado la novelon „La carino de Târnovo”.

Em. Stanev estis prozisto kun tre vasta krea diapazono: li verkis dekojn da rakontoj por plenaĝuloj kaj infanoj, multajn novelojn kaj romanojn kun historia kaj nuntempa temaro kaj ankaŭ nefinitan romanon, en kiu li traktas la problemon pri la respondeco de la scienculoj al la homaro.

La rakonto „Agloj”, kiun ni publikigas en tiu ĉi numero en traduko de nia neforgesebla E-poeto kaj tradukisto Simeon M. Simeonov, estas el la serio de verkoj pri animaloj — verkoj, kiuj metas Em. Stanev apud la klasikuloj Elin Pelin kaj Jordan Jovkov, jam bone konataj al la E-legantoj.

Li posedis raran talenton reenkarigi, kunfandi kun la naturo kaj interpreti ĝin tia, kia ĝi estas — sen haltigoj, sen influoj de la civilizacio — kaj tre bone kompreni ĝiajn leĝojn. La pentrado de la morto en liaj verkoj estas neceso de la vivo mem. En la regno de la instinktoj, kie furiozas batalo por daŭrigo de la gento, la nocio krueleco ne havas sencon. Em. Stanev ne homigas la animalon (kiel Jovkov ek-



zemple), li strebas esti fidela al la rigoraj veroj, kiuj regas en la mondo de animaloj.

Kiel ĉiu granda verkisto, Em. Stanev estis mirinda animkonanto kaj eksterordinara majstro de la stilo. Jen pro tio la tradukado de liaj verkoj en fremdajn lingvojn, inkluzive Esperanton, estas malfacila kaj tre delikata afero.

V. M.



Emilijan Stanev

AGLOJ

Antaŭ kvindek aŭ sesdek jaroj ilia nesto estis sur la rokoj je la transa deklivo de la intermonto, kie nun pasas la fervojo. Tie ili loĝis multajn jarojn, ĝenate de neniuj. De sur la altegaj lokoj ili ofte observis la arojn da ĉamoj, kiuj malsupreniris al la eta blua lago, la urogalojn, la timemajn kapreolojn kaj la grandajn brune-nigrajn ursojn, kies kuŝejoj estis surkreskitaj de geranio kaj hedero.

Neniu povus diri ion pozitivan pri ilia pasinteco, ĉar ĝi ampleksis periodon, kiu daŭris tutan jarcenton kaj duonon. Neniu sciis kie troviĝas ilia kovejo, kie ili renkontiĝis por la unua fojo kaj per kiuj eventoj estis plenigita ilia vivo dum tiu tempo. Tiam tra la intermonto malofte pasis homoj-rabistoj aŭ paŝtistoj, kiujn la praarbaroj englutis en siajn mallumajn densejojn. Kaj kiam la fajfsignalo de la unua lokomotivo tondre eksonis en la mallarĝa

intermonto kaj la hakiloj nudigis ĝiajn ambaŭ deklivojn, la agloj forlasis por ĉiam tiun ĉi lokon.

Ili transloĝiĝis en la mezon de la montaro, sur la plej altan nealireblan rokon, kiu similis je grandega flava dento, elkreskinta inter la krutaj ŝtonlavangoj kaj ravinoj, kie matene kaj vespere rampadis nebuloj. La nuboj, kiujn la vento pelis tra la ĉielo, kvazaŭ tuŝis la roko-supron, kaj kiam oni fiksis la rigardon al ili, oni havis la iluzion, ke ne la nuboj moviĝas, sed la roko mem kuras malantaŭen, kune kun la monto kaj kun la tuta tero.

La suno kaj la pluvoj estis eroziintaj kaj maldikigintaj la supron de la kalkroko, kaj la subteraj akvoj antaŭ jarcentoj estis traborintaj en ĝia mezo grandan kavon. En tiu malgranda kaverno troviĝis ilia nesto.

Kelkaj vergoj, makulitaj per birdfekaĵoj kaj rustkolorigitaj pro sango, antaŭgardis la aglojn kontraŭ falo en la abismon. Feloj de sovaĝbestoj kaj plumoj de urogaloj kovris la internon de ilia simpla kaj kruda rifuĝejo.

Vespere, kiam ili revenis por tranokti, sur la rokupro estis ankoraŭ lume. Tie ĉi la sunradioj sin montris la unuaj kaj estingiĝis la lastaj. La lumo malrapide retiriĝadis al la pinto de la kalkroko kaj nerimarkite forbrulis pale-roza kaj delikata. Dum tiuj vesperhoroj la eternaj neĝoj sur la ĉirkaŭaj nontosuproj fajreris, rubenruĝaj kaj virge puraj; malsupre, en la abismo, la nebuloj kolektiĝis kiel gregoj, kaj la maljunaj pinoj fariĝis grizaj. La malvarma kaj egala silento de la monto fariĝis ankoraŭ pli peza kaj streĉa, kvazaŭ la monto mem silentiĝis, atendante ion grandan kaj gravan. Nur la unutona muĝado de ĝiaj riverakvoj sonis pli laŭte, kiel sola voĉo, parolanta pri la senŝanĝa kaj eterna esenco de la vivo.

La agloj revenis en sian neston unu post la alia.

Unue, super la kresto de la najbara montosupro montriĝis la aglino. Ŝi malsupreniĝis al la roko kaj komencis fari cirklojn ĉirkaŭe, kvazaŭ zonante ĝin per nevideblaj ŝnuroj. Dume estis klare videblaj ŝiaj larĝaj, hirtaj flugiloj, la mallonga kvadrata korpo kaj eĉ la kapo, moviĝanta ĉiuflanken.

Iom poste, de la okcidento, kie la sunsubiro estis sangkolorinta la ĉielon, montriĝis ankaŭ la aglo, kiel nigra punkto, kreskanta minace rapide. Post minuto li jam troviĝis super la roko, kie la aglino ĉiam ankoraŭ flugis spirale.

Ambaŭ birdoj surflugis la rokon solene kaj malrapide, simile al du mallumaj, malbonaŭguraj ombroj.

Tie ili restis senmovaj, severaj, fikse rigardante foren al la horizonto, kvazaŭ denove vidante la vastegan spacon de la ebenaĵo, super kiu ili estis flugintaj dum la tago — la riverojn, la vojojn kaj la urbojn, de kie atingis ilin la bruo de alia vivo.

De tempo al tempo la aglino, kiu estis pli granda ol la viraglo, proksimiĝis al li per pezaj grandaj saltoj, kun minace levitaj flugiloj kaj etendita kolo kaj obstine fiksis la rigardon al liaj okuloj, kvazaŭ ŝi dezirus sciigi al li ion. Ŝia sovaĝa rigardo ardis kruele kaj fiere, kaj la iom kliniĝinta korpo similis per sia embuska pozo murdiston, kiu proksimiĝas al sia viktimo.

Poste ili ambaŭ komfortigis sin sur la roko kaj tie endormiĝis.

Estis noktoj, kiam en la monto ekmuĝis ŝtormo, komenciĝis pluvego, aŭ subita neĝo blankigis ĉion. La agloj tamen restis trankvilaj sur siaj lokoj, indiferentaj al la furiozanta elemento.

Matene ili vekiĝis jam ĉe la frua aŭroro, dum la montovaloj estis ankoraŭ plenaj de mallumo, kaj ekskuinte sin forflugis por serĉi nutraĵon.

La aglino sin direktis al la ebenaĵo orienten. La viraglo ordinare elektis por si la ondforman terenon sude. Ĉiu el ili havis sian ĉasregionon kaj neniu kalkulis je la helpo de la alia ĉe la serĉado de rabaĵo. Nur kiam ili devis ataki aron da ĉamoj, elirintaj sur la altajn rokuprojn, proksime de iu abismo, ili agis kune. Tiam, ili bruegante sin ĵetis super sian viktimon, puŝegis

ĝin per siajflugiloj, ĝis ĝi senkonsciiĝas kaj falas en la abismon. Poste, kun triumfa kriado ili atakis la disŝiritan kadavron.

Iufoje ili embuskis uroĝalon, elirintan el la densejo, aŭ iun leporon. Ili pacience rondflugis super sia ĉasaĵo kaj tutajn horojn atendis la favoran momenton por ataki. Kaj se en la montaro ili sukcesis kapti nenion, tiam ili forflugis al la ebenaĵo, por serĉi putriĝintajn kadavrojn.

Ilia flarkapablo malkovris kadavron je distanco de kelkaj kilometroj. La suprenirantaj aerfluo, kiu, ili profitis por levi sin alten, multe helpis ilin. Tio estis iliaj vojoj en la ĉielo. Ilia rigardo kaptis ĉiujn detalojn sur la tero je granda distanco. El la altaĵo ili ĉiutage vidis la bluan strion de la maro, la vastan spacon de la ebenaĵo kun urboj kaj vilaĝoj, super kiu ili ofte rondflugis, logate de la hejmbirdoj en la kortoj. Ĉiu valet, ĉiu torento, ĉiu monteto estis al ili konataj, ĉar en la daŭro de du jarcentoj ili estis flugintaj super tiu ĉi regiono. La ŝanĝoj, okazintaj malsupre dum tiu periodo, resitis por ili nerimarkeblaj, ĉar ili fariĝis iom post iom kaj malrapide. La vilaĝoj estis plivastiĝintaj, same kiel la urboj, kaj la arbaroj male — maldensiĝis, la riveroj mallarĝiĝis siajn fluejojn, kaj la vojoj estis plimultigitaj siajn blankajn fadenojn. La bruoj, venanta de la tero, iĝis ĉiam pli laŭta, pli daŭra. Kaj kune kun tiuj ŝanĝoj, la agloj ĉiam pli malfacile trovis nutraĵon; la ĉasaĵo konstante malaperis, kaj kadavroj de mortintaj bestoj jam estis malofte troveblaj.

La agloj estis devigitaj forflugi malproksime al la bordoj de la maro aŭ al la nordo, al la Balkan-montaro. Tie la ŝanĝoj ne estis tiel grandaj.

Tre ofte dum kelkaj tagoj ili ne trovis nutraĵon, sed tio ne maltrankviligis ilin. Ilia vivenergio estis tiom granda, ke la malsatado ne povis konsumi ilin. Tio faris ilin nur pli kruelaj kaj pli kuraĝaj.


Dum sia longjara ekzistado ili memoris multajn militojn, plurajn plagojn kaj epidemiojn. Ilia intuicio pri ĉiu malfeliĉo, proksiniĝanta malsupre sur la tero, estis akriĝinta en la daŭro de ĉi tiuj du jarcentoj. Ili komprenis kion signifas la malproksima tondrado de la kanonoj, kiu atingis ilian aŭdon, kiel ĝoja antaŭsigno, promesanta al ili abundan festenon. La brulegoj kaj laodoro de fumo venigis ilin al la batalkampoj. De alte ili spionis la homkolonojn, la veturilarojn kaj la fuĝantojn, ili aŭskultis la muĝadon de la brutaroj kaj la bruadon de la bataloj, estante certaj, ke tiun ĉi fojon ili havos abundan nutraĵon dum longa tempo. Tiam ili forlasis la montaron kaj kvazaŭ por ĉiam transmigris tien, kie furiozis la milito. La homa karno prezentis ne malpli bongustan manĝaĵon ol tiu de la bestoj. Ili interdividis sian rabaĵon kune kun la korvoj kaj la vulturoj. Kaj poste, kiam la milito estis jam forpasinta, longan tempon ili flugis super la samaj lokoj.

Ili estis atestantoj de la invadoj de la pesto, pro kiu iam la vilaĝoj senhomiĝis, kaj sur la vojoj oni ne povis plu vidi iun ajn vivan estaĵon — ili rememoris la teruran silenton, kiu regis super la tero en tiuj malproksimaj tempoj, kiam la kamparoj restis ne kulturataj kaj la rikolto putris. Tiam la agloj kolektiĝis je grandaj svarmoj kaj kiel veraj mastroj trankvile kaj fiere rondflugis alte super la mutiĝintaj loĝlokoj.

En tiuj delonge forpasintaj tagoj, apud la nudaj montetoj de iu kaduka kaj malriĉa urbeto kun pintigitaj kiel blankaj krajonoj minaretoj kaj kun detruitaj malnovaj turoj kaj muroj ĉiun semajnon la homoj lasis al la agloj nutraĵon, ĉar ili respektis ilin kaj admiris iliajn forton kaj nealireblecon. Tiam ofte okazis en la montaro malgrandaj bataloj, atakoj, murdoj kaj ĉiam estis trovebla la kadavro de iu rabisto aŭ de pacema malfeliĉulo, buĉita apud la vojo.

Foje, ĉe iu tia kadavro la viraglo trovis ledan monujon, plenan de mono. Ĝi estis sangmakulita kaj tio igis lin kredi, ke ĝi estas peco de karno. Li forportis ĝin en sian neston kaj metis ĝin antaŭ la aglidojn. La monujo restis tie ĝis la ledoj forputris kaj disŝiriĝis. La moneroj falis dise kaj por ĉiam restis kaŝitaj for de la avidaj homaj okuloj.

Tiel estis forpasinta ilia vivo ĝis nun. Ĉiuprintempe la aglino demetis unu aŭ du ovojn



kun bluetaj makuloj kaj kuŝigis sin sur ilin, por kovi. Kaj kiam la aglidoj plenkreskis, ili forlasis la neston kaj transmigris malproksimen en la ĉirkaŭaj montoj.

Neniu danĝero kaj neniu malamiko maltrankviligis ilian kvietan vivon, kvazaŭ ili starus super la vivo kaj super la monto, netuŝeblaj eĉ de la tempo kaj de la ŝanĝoj, okazantaj malsupre sur la tero. Vere, iufoje la homoj provis pafi ilin, sed la agloj sin gardis bone, ĉar iliaj okuloj vidis je granda distanco eĉ la plej etajn movojn de la homo kaj facile divenis liajn intencojn...

* * *

Unu matenon, antaŭ la aŭroro, ili vekiĝis pro subtila pluvo, kiu ĵus estis komencinta fali per etaj gutoj.

Oriente, malantaŭ la malserena kaj minaca silueto de la monto, maldika fadeneto kun la koloro de rustkovrita feraĵo indikis la alvenon de la aŭroro. Kelkaj ĉifonaj nuboj ruĝigis siajn randojn. Regis neordinara silento, mallumo kaj sufoko.

La ruĝa makulo oriente kreskis konstante. Inter la nuboj ekbrilis stelo. Poste verda fulmo pikis la horizonton. La nuboj ekmoviĝis. Ekblovis vento. Sur la grandega montokresto sterniĝis malhela ombro. Evidente, proksimiĝis ŝtormo.

La viraglo, dormanta sur la rando de la roko, iĝis maltrankvila. Lia instinkto instruis lin, ke li ne plu devas resti tie ĉi. Li kaj la aglino rigardis unu la alian. La vento ĉiumomente pliintensiĝis kaj hirtigis ilian plumaron. Subite varma aerondo blovis ilin. La sekvintan momenton nova fulmo lumigis la tutan monton kaj ĝia tondro trafendis la firmamenton. De la kontraŭa montosupro aperis pezaj, nigraj nuboj, kiel granda aro da gigantaj bestoj. La aŭroro dronis en ili, la nokto revenis. La torentoj ekbruegis kaj ilia muĝado miksiĝis kun la bruado de la arbaroj.

La ventego minacis porti la aglojn for de la roko. La unua ekflugis la viraglo. Kunpremite la flugilojn, li provis sin kaŝi en la abismon. Tamen la ventego levis lin supren, kiel nigran bulon, kiu malaperis en la malluma maso de la nubo. Ĝi preskaŭ estus puŝinta lin kontraŭ la rokoj. Tiam, eksvinginte la flugilojn, li sin direktis kontraŭ la vento. La mallumo malhelpis lin surflugi. La nubo kaptis kaj forportis lin. Li estis devigita lasi sin porti de tiu potenca forto, kontraŭ kiu li estis senpova. Li penis nur malintensigi la rapidecon de la flugado. Lia tre disvolvita sento pri orientiĝo ne forlasis lin ankaŭ nun, kiam ĉirkaŭ li regis nur mallumo. La ventego lin kunportis norden, trans la monton. Iom pli malproksime, super la krutaj montdeklivoj, la malsupreniĝanta ventego estus faliginta lin en la abismojn, sed li ĝustatempe sukcesis reteni sin, disetendante la vostplumaron kaj fortege svingante la flugilojn. Li sciis, ke tio estas nur la komenco de la ventego, tial li per ĉiuj siaj fortoj penis levi sin pli alten, por eliri el la periferio de la ciklono. Jam komencis plui, la fulmotondroj sekvis unu post alia, kaj nur en ilia malvarma lumo li povis vidi la vilajn nubegojn, grandajn kaj senlimajn, kiel malluman maron, en kies mezo li estis fluganta.

Tutajn tri horojn daŭris lia lukto kun la ŝtormo. Fine, li rezignis levi sin super la vento. Li estis forportita malproksime de la montoj, malsekigita, konsumita kaj senforta. La nubo, kiu forportis lin, disŝiriĝis, kaj la aglo vidis sub si malgrandan ebenaĵon, ĉirkaŭitan per girlando da malaltaj montoj. Larĝa sunradio, penetrinta iamaniere, lumigis la grenkampojn, proksime de iu urbeto, blankanta meze de la ebenaĵo. Kelkajn fojojn jen fariĝis lume, jen denove mallumiĝis, ĉar la nuboj disiĝis kaj denove kuniĝis. La rapideco de la vento malpliigis.

La malsekigita plumaro de la aglo komencis fariĝi peza al li. Li apenaŭ povis teni sin en la aero kaj, troviĝante super la urbeto, li estis devigita preskaŭ alteriĝi. Novaj nuboj, venantaj de malantaŭe, minacis atingi lin. Ili rampis de la monto, kune kun la nebulo, kiu invadis la ebenaĵon, kiel grandegaj hordoj de iu armeo.

Vidinte la tegmentojn de la domoj kaj la mallarĝajn stratojn de la urbeto, la aglo elektis por si unu el la kamentuboj kaj surflugis ĝin.

Estis la naŭa horo. Laŭ la ĉefa strato pasis grupo da montaranoj, irantaj al la bazarplaco. Grincadis veturiloj kaj laŭte resonis la martelfrapoj de la kaldronistoj. La strato, malsekigita de la pluvo, odoris je ĉevalsterko, malseka fojno kaj koto. Vidalvide, trans la strato, vidiĝis brulanta forno de panbakejo, kaj ŝvebis laodoro de ĵus bakita pano. Super tiu ĉi loko la pluvo estis trapasinta ne tiel torente kaj uragane, la urbeto estis nur banita, kaj pro tio ĝi aspektis ankoraŭ pli senbrua kaj pli kvieta.

La unuan fojon en sia vivo la aglo troviĝis tiom proksime de homoj. Li aŭdis iliajn voĉojn, vidis iliajn vizaĝojn, iliajn plej etajn movojn kaj sentis neniun timon. La homa mondo estis konata al li, kvankam li estis vidinta ĝin de alte. Li eĉ ne miris. Pro la ega laciĝo li sentis sin preskaŭ malsana. Liaj flugiloj pendis, la plumoj elstaris hirte kiel lancoj, kaj el lia korpo leviĝis vaporo.

Neniu el la pasantoj sur la strato estis rimarkinta lin. Malsupre la homoj pasis, sen levi la kapon, kaj li restis tie trankvila. Sed ĉirkaŭ la tagmezo, kiam la oficistoj kaj la infanoj komencis reiri hejmen, la panbakistoo lin vidis kaj montris al sia najbaro, la selisto. Baldaŭ sur la strato kolektiĝis tuta amaso da plenaĝuloj kaj infanoj. Ĉiuj montris al li per la manoj kaj brue parolis.

La aglo staris sur la kamentubo senmove, kvazaŭ dormante. Lu ĵetis al li ŝtonon, kiu brue ruliĝis sur la tegoloj de la tegmento. Lu alia celanta lin, ĵetis terbulon. Komence ĉiuj diskutis, de kie li estis veninta kaj kiamaniere li estis surfluginta la kamentubon, poste ili komencis svingi la manojn, por igi lin forflugi. Kiam tio ankaŭ ne helpis, ili disiris. La panbakisto forpelis la infanojn kaj iris tagmanĝi.

La strato senhomiĝis. Super la urbo ekbrilis la suno kaj ankoraŭ pli intense ekodoris je ĉevalsterko kaj je koto.

Tiam la helpselisto, junulaĉo kun ruzaj okuloj kaj lentugoj sur la vizaĝo, decidis mortigi la aglon. Ŝarginte malnovan fusilon per plumboglobetoj, uzataj por fiŝreto, li surgrimpis la tegmenton de la apuda fojnejo, ekkaŭris tie kaj komencis celi la aglon.

La birdo staris ankoraŭ tiel senmove, kvazaŭ ĝi kontemplus la grandiozan mondon de la montaro, de kiu la ŝtormo ĝin estis forŝirinta. Ĝi ne vidis la junulon, kiu staris malantaŭ ĝi.

Ektondris pafo. La malnova pafilo elvomis nubon el blanka fumo kaj tutan svarmon da plumberoj.


La aglo ekpendis sur la kamentubo, kaj kun etenditaj flugiloj falis sur la tegmenton...

El la najbaraj butikoj elsaltis homoj, ekestis tumulto. Iuj insultis la helpseliston, aliaj kriis al li malsuprenigi la aglon de sur la tegmento. Post momento la ankoraŭ varma korpo de la birdo obtuze falis sur la straton...

Post du semajnoj ĝia figuro, preparita de la instruisto de natursciencoj, ornamis la buferdon de la urba kazino.

La aglino atendis sian kamaradon kelkajn tagojn. Ŝi estis savinta sin el la ventego, enŝovinte sin en truon de la roko. Kiam la viraglo ne revenis eĉ post la deka tago, ŝi forlasis la rokon por ĉiam.

La pintforma flaveta kalkroko restis solece elstaranta. Nur la nuboj pasis preter ĝi, kaj meze de la ĉirkaŭa silento ĝi ŝajnis kiel granda putra dento, kaduka kaj al neniu bezona.



E-Klubo

„La gajaj migrantoj“

Oktobre 1986 estis organizitaj du unuagradaj E-kursoj por turistoj. Post kvarmonata intensa lernado parto el la kursanoj komencis lerni en duagrada kurso. Post la sukcesa fino de tiu kurso, la partoprenantoj daŭrigis aktivajn kontaktojn en movadaj aranĝoj kaj ekskursoj.

La 6-an de septembro 1987 grupo de ĉirkaŭ trideko da turistoj-esperantistoj, la plimulto el kiuj estis ekskursantoj, migris al la montodomo „Esperanto“ sur Vitoŝa-monto. Tie ili fondis turistan grupon „La gajaj migrantoj“. Per ties fondo la grupanoj celis organizite partopreni turismajn E-aranĝojn en Bulgario kaj eksterlande. La organizitaj aranĝoj de la turista grupo estas malfermitaj por ĉiuj geesperantistoj en Sofio. La nura kondiĉo estas, ke dum grupaj iniciatoj oni ne krokodilu.

Kaj jen jam duan jaron la turista grupo portas ĝojon al ĉiuj. Oni organizis ekskursojn al montoj Vitoŝa, Plana, Belasica kaj Balkan-montaro.

Eksterlande niaj turistoj partoprenis oktobre 1988 en urbo Poznan — Pollando la „Feston de la artoj“. Ĥristina Ivanova faris raporton „Muzikaj ĝenroj“ antaŭ niaj gesamideanoj.

Printempe, de la 7-a ĝis la 9-a de aprilo 1989 en urbo Šrem (40 km for de urbo Poznan) denove niaj grupanoj (Ani Futekova, Rangel Dimĉev, Ivan Zarev kaj aliaj) partoprenis en „Grandpolaj Esperantaj Printempaj Tagoj“. Ani Futekova aktivis en

la belarta programo. Rangel kaj Ivan donis intervjuon al ĵurnalistino de la loka ĵurnalo „Tigodnik ludovi“ pri la agado de nia turista grupo „La gajaj migrantoj“.

La menciitaj ekskursoj kontribuis por interkonatiĝo kaj formado de bonaj rilatoj inter la membroj de la grupo. E-turismo antaŭvidas: ekskursojn, renkontojn, moviĝantan parolantan rondon, vojaĝojn k. a., kiuj donas eblecon al ĉiuj praktiki Esperanton en la ĉiutaga vivo. La varia turista agado elvokis vivan intereson. Al nia grupo komencis aliĝi kaj partopreni niajn iniciatojn novaj turistoj-esperantistoj.

Neforgeseblaj restos en la konscio de esperantistoj la ekskurso al la natura rezervejo „Skaklja“, la romantikaj vojetoj tra la arbaro, la enigma akvofalo sub vilaĝo Zasele kaj la ĉirkaŭa verdaĵo. Multegaj estas la belegaj montaraj anguloj en Bulgario.

En la nova plano de la grupo (nun la turista grupo ricevis novan nomon E-Klubo „La gajaj migrantoj“) antaŭstaras novaj interesaj ekskursoj. Unu el ili estas la ekskurso al la pitoreska intermonto inter la du montoj — Zemenska kaj Konjavska, kaj la mirinda akvofalo sub vilaĝo Polska Skakavica. Nehazarde Konstantin Ireĉek, tiu perfekta konanto de nia lando, asertis per sia plumo, ke tio estas „la plej bela angulo de Balkana duoninsulo“...

Ivan IVANOV



Foto de la numero: Malsupren al montodomo „Esperanto“ sur Vitoŝa-monto.

Foto: Emil IVANOV



Andrej DEMENTJEV

PRI NENIO BEDAŬRU

*Vi neniam, neniam pri io bedaŭru:
Tio, kio okazis, okazis. Do jen —
Kredu firme, ke via bedaŭro ne daŭru:
Kun pasinto ŝiriĝis etera faden'.*

*Ne bedaŭru pri io, se ĝi estas natura,
Se por viaj intencoj ekzistas la lim',
Nur la lag' de l'animo ĉe vi restu pura,
Birde ŝvebu espero en via anim'.*

*Ne bedaŭru, se estas vi bona donanto,
Eĉ se venas responde nur mok' kaj rikan'.
Tiu estas genio, alia — gvidanto,
Sed ne tuŝis vin ties turmentoj kaj van'.*

*Vi neniam bedaŭru pri sekiĝo de puto,
Pri komenco malfrua, pri mort' sur pavim'.
La alia... genie li ludu ja fluton,
Sed la kantojn li prenas el via anim'!*

*Pri nenio bedaŭru, ne perdu larmgutojn
Ĉu pri tagoj pasintaj aŭ pasinta pasi'.
La alia... genie li ludu ja fluton,
Tamen eĉ pli genie aŭskultis lin vi.*

Elrusigis: Nikolao GUDSKOV

Dragomir ŜOPOV

ETERNECO

*Ĉevalo forgesita.
 Bluvespero.
Alblovo de la fojn'-odoro...
Ĉi tio estas ja la infaneco
 fora kaj libera.
Kaj tie nudpiede vagas
 mia rememoro.*

AMO

*Mi rememoras, ke vi staris
belega apud greno spiko.
Kaj blanka lumo malavare
fluadis ĉirkaŭ ni kiel muziko.

Sed jen — postkuris jaro jaron
kaj kvankam tre ŝanĝita jam —
mi gardas en mi la kamparon
kaj vin, neforgesebla mia am'.*

ARBO

*Kaj plagojn, kaj feliĉon konas vi,
jen fulmoj super vi ekbrulas forte,
sed vi ripetas: „Staru sen hezit',
eĉ kiam oni vin faligas mortel'”*

*Ho, arbo, mi, vidinta ĉion jam —
varmegojn, neĝostormojn pli kaj pli —
nenion volas mi kun tia flam'
krom tion — ne forgesi vian voĉon optimis-
man
kaj kredi al si mem: ne estas iluzi',
ke vi ekzistas.*

Tradukis: Venelin MITEV



Grafikaĵo: Penka PETKOVA

NORMOJ DE REDAKCIA POLITIKO KAJ ETIKO

REDAKTANTO — PERFIDANTO

Estas diraĵo en la itala lingvo, kiu tekstas jene: **traduttore — traditore** (tradukanto — perfidanto). Nu, oni ja povas alivortigi ĝin per la esprimo **redattore — traditore** (redaktanto — perfidanto). Ofte okazas, ke redaktoroj de periodaĵoj modifas partojn de la teksto de publikigitaj manuskriptoj. La kutima kialo estas, ke la lingvouzo en la koncerna periodaĵo devas esti unuforma. Malofte redaktoroj pridiskutas tiajn ŝanĝojn kun la aŭtoroj, kaj ili preskaŭ neniam pravigas la anstataŭigon surbaze de konsekvencaj principoj. Ankoraŭ unu mistraktado de verkoj fare de tro zelotaj redakcianoj, estas la lardado de la teksto per propraj komentoj kaj aldonaĵoj, kiuj ne estas signitaj per la mallongige „ndlr“ (noto de la redaktoro). La rezulto estas, ke legantoj ne kapablas diferencigi la originalajn partojn de la verko disde la altruditaj asertoj kaj nocioj de la redaktoro. Neniu verkisto povas toleri tiuspecan manipuladon de sia verko, sed se ĝi trafas en la manojn de senrespondeca, neetika redaktoro, ĉiu protesto estas vana.

REDAKCIA ARBITRECO

Manke de normoj de redakcia politiko kaj etiko, iu ajn povas modifi manuskriptajn tekstojn, foje kun antaŭa averto kaj diskuto, foje sen iu ajn interkonsento kun aŭtoroj. Kiu ne petas permeson fari ŝanĝojn, agas ne nur arbitre, sed ankaŭ malĝentile! Redaktoroj, kiuj praktikas tiun unuflankan redaktadon povas damaĝi la reputacion de aŭtoro. Se aperas en la publikigita verko vortformoj montrantaj diferencojn kompare kun tiuj registritaj en vortaroj — ekzemple arkaikiĝon, nekutiman literadon aŭ deflankiĝon de evolutendencoj en Esperanto — oni ne povas scii, ĉu tiuj lingvaj trajtoj venas el la plumo de la verkinto aŭ ĉu ili rezultas el kaprico aŭ eĉ obsedo de la redaktoro.

ETIKA KODO POR REDAKCIA POLITIKO

Mi ne scias, ĉu iam estis farita listo de gvidlinioj aŭ reguloj por la redaktado de Esperantaj libroj kaj periodaĵoj. Ŝajnas al mi, ke klara priskribo de la devoj kaj respondecoj de aŭtoroj kaj redaktoroj estas bezonata por eviti malagrablaĵojn. Ĉar nun ekzistas fakorganizaĵo — Esperantlingva Verkista Asocio (EVA) — kies membroj konsistas el aŭtoroj, eldonantoj kaj redaktoroj, estas konsilinde, ke ĝi okupiĝu pri la formulado de etika kodo por redaktoro. Ĝis tiu demando estos prezentita al EVA, mi deziras ĉi-sube provizore prezenti kelkajn proponojn por tiu kodo, kiu eventuale povos fariĝi akceptita normo en la tuta Esperantujo.

TRI VARIAĴOJ DE REDAKCIA POLITIKO

Ekzistas tri eblaj procedoj, kiujn redakcio povas sekvi por prepari manuskripton por publikigo.

1. Oni permesas al ĉiu aŭtoro uzi la lingvon laŭ sia bontrovo, kaj la respondeco ĉiam restas ĉe la verkinto. Eble la sola limigo estu kontraŭ lingvouzo, kiu estas ortografie, semantike aŭ gramatike erara, sed redaktoro devas **objektive** demonstri tion. Ĉi-kuntekste estas necese diferencigi gramatikaĵojn disde stilaj apartaĵoj. Tiu ĉi sinteno donas la plej ampleksan liberon al la aŭtoro rilate ĉiujn aspektojn de lingvouzo.
2. Ĉe la antipoda poluso, oni devigas konformiĝon ĉiurilate kaj senescepte al principoj starigitaj de la redakcio, por ke estu atingita en la publikigaĵo absoluta unuformeco inter la verkoj de diversaj aŭtoroj.

3. Enkadre de klare formulitaj redakciaj reguloj aŭ principoj, oni permesas al aŭtoroj liberon rilate la lingvouzon, kondiĉe ke ili povas motivi siajn elektojn per aliaj egale aŭ eĉ pli konvinkaj principoj. Ŝajnas, ke la redakcioj de la plejmulto da Esperantaj publikigaĵoj pli-malpli samopinias. La granda merito de tiu ĉi fleksebla sinteno estas, ke ĝi evitas sufokon aŭ paralizon de vivanta, daŭre evoluanta lingvo. Se okazas konflikto inter la redakciaj normoj kaj la persona uzo de iu aŭtoro, ĉiam estas eble prezenti klarigojn kaj pravigojn ambaŭ flanke en la formo de piednotoj, en glosaro kun ampleksaj komentoj, aŭ en apendico aldonita al la koncerna verko. Tiu ĉi procedo estas evidente la plej demokrata.

LISTO DE UZEBLAJ PRINCIPOJ

La principoj en la sekva listo estas nek universale aplikeblaj, nek devigaj por ĉiu kazo, ĉar ofte estas necese allasi esceptojn, se eble, konforme al alia principo. La celo estas krei plejeble harmonian sistemon sen kriaĉantaj kontraŭdiroj. La vicordo de la principoj ne indikas ilian relativan gravecon, ĉar estas malfacile objekte mezuri tion.

1. Zamenhofa uzado.
2. Longdaŭra uzado fare de aliaj esperantistoj, laikoj kaj fakuloj.
3. Registrado en vortaroj, glosaroj, fakterminaroj ktp.
4. Apogo de elstaraj esperantologoj.
5. Oficialigo fare de la Akademio de Esperanto.
6. Maksimuma internacieco de vortformoj kaj signifoj.
7. Analogio kun aliaj vortoj en Esperanto, havantaj similan etimologion aŭ parencan signifon, por eviti malsimetriojn.
8. Evito de homonimoj, paronimoj kaj ankaŭ kalkeoj (paŭsaĵoj).
9. Elektro de literado havanta facile prononceblajn sonojn kaj songrupojn.

10. Elektro de radikoj, kies formo ebligas facilan kaj senliman pluformadon.

11. Prefero al formado de terminoj surbaze de morfemoj jam ekzistantaj en la lingvo por eviti nenecesajn neologismojn.

12. Prefero al polisemio, kondiĉe ke ne povas okazi miskompreno aŭ ambigueco.

13. Kombino de grafismo kaj fonetismo, por ke vortoj estu rekoneblaj skribe kaj parole.

14. Evito de inventitaj kaj arbitre formitaj esperantismoj.

15. Limigita asimilado de nur la plej ofte kaj bone konataj nomoj de lokoj kaj personoj.

Kompreneble, oni povas aldoni pli da principoj al tiu ĉi listo.

LA LIMOJ DE REDAKCIA RESPONDECO

Ĝis kiu limo povas redaktanto enkonduki ŝanĝojn en verkon? Pro manko de spaco en periodaĵo, kelkfoje estas necese mallongigi tro ampleksan tekston, sed tiu procedo koncernas nur ellason de partoj, kutime indikitan per interkrampa tripunkto. Se la redaktoro aldonas al vortoj aŭ frazoj en la teksto apartan emfazon, klarigon aŭ komenton, li devas averti legantojn pri tio per enkrampa rimarko aŭ per piednoto. Sed neniu redaktoro havas la rajton reverki tekston, krom se la aŭtoro petas tiun helpon kaj donas eksplicitan permeson. Fine, se redaktoro pro iu kialo ne estas tute kontenta pri verko, li ja rajtas rifuzi aperigi ĝin en sia periodaĵo. Li, do, resendu ĝin al la aŭtoro kun klarigo. Se li inklinas publikigi ĝin nur post modifado aŭ reverkado fare de la aŭtoro, li akordiĝu kun tiu ĉi, por ke poste ne okazu miskomprenoj. La ideala maniero atingi senkonfliktan interkonsenton estas sendi al la aŭtoro kopion de la kompostita teksto, por ke li vidu, kiel lia verko aspektos en publikigota formo, kaj por ke li samtempe korektu tiun presprovaĵon.

Bernard GOLDEN

Internacia renkontiĝo en Drohobîč



Geesperantistoj el Pollando, Hungario, Ĉeĥoslovakio, Bulgario, el sovetaĵ respublikoj — entute ĉ. 200 personoj partoprenis internacian E-renkontiĝon de la 12-a ĝis 18-a de oktobro pasintjare en la ukraina urbo Drohobîč, Lvova regiono.

Por la unua fojo en Drohobîč okazis Internacia E-renkontiĝo, kies organizanto estis loka E-klubo „Kolombo de paco” kun prezidanto Vasil Stanoviĉ — ĵurnalisto, estrarano de Tutmonda Esperantista Ĵurnalistista Asocio (TEĴA).

Inter bulgara societo „Stoju Kalpazanov” Velingrad, kaj klubo „Kolombo de paco” ekzistas amikaj interrilatoj. En 1988 kaj lastsomere esperantistoj el Drohobîč vi-

zitis Velingrad kaj partoprenis nian aranĝon „Tra valoj kaj arbaroj”.

Pro tio nia 14-persona grupo estis tre afable akceptita en Drohobîč. La aranĝo okazis en hotelo „Drohobîč”, kie la kondiĉoj estis tre bonaj. La ĉirkaŭaĵo estis bela — granda parko kun diversaj arboj.

Pri la tuta organizo de la aranĝo kaj pri la ĉiutaga programo zorgis la prezidanto de la loka Esperanto-klubo. Al li helpis Luba Prindin, Irina Pavlišak k. a. Ĉiutage en nian hotelon venis lokaj esperantistoj. La etoso estis amika.

La partoprenantoj en la renkontiĝo estis salutitaj de la urbestro kaj de la sekretario

de la Urba Komitato de Komsomolo. Vespere okazis granda spektaklo de la studenta dancensemblo de la urba supera pedagogia instituto, kiu prezentis ukrainajn folklorajn dancojn kaj kantojn.

Oni okazigis renkonton kun prezidanto de SEU Vladimir Samodaj — ĵurnalisto el gazeto „Moskva Novaĵoj“, kiu parolis pri la nuntempa E-movado en Sovetunio, pri ĝiaj problemoj kaj taskoj.

Grandan impreson faris al ni la fakto, ke en la renkontiĝo partoprenis multe da junaj sovetiaj esperantistoj el diversaj urboj.

En la „Domo de Amikeco“ estis organizita fotoekspozicio sub titolo „Esperanto, la planedo kaj ni“. En ĝi estis elmontritaj fotoj de esperantistoj el diversaj landoj, inkluzive de Petko Arnaudov (Bulgario). Ĝi estos

reprezentita de ĝia organizanto Stanoviĉ en diversaj eŭropaj landoj.

Ni vizitis la domon-muzeon de konata ukraina verkisto Ivan Franko.

Oni organizis ekskursojn al urbo Trusavec kaj en Karpatoj, kie ni konatiĝis kun historiaj lokoj.

Nia grupo renkontiĝis kun geesperantistoj de E-klubo el urbo Minsk laŭ ilia propono kaj ili faris filmon pri tio. Ni interparolis pri niaj kluboj, pri E-movado kaj pri diversaj problemoj en nia vivo.

Ni revenis el Soveta Ukrainio kun multaj impresoj. Tie ni trovis novajn geamikojn.

ing. Boris GAĜANOV,
Velingrad

Multjaraj kontaktoj

Pli ol 20 jarojn daŭras la amikaj rilatoj inter la esperantistoj de la ĝemelaj urboj Ŝumen kaj Magdeburg. Unue la kontaktoj estis individuaj — korespondis aŭ reciproke gastis nur apartaj membroj de E-societo „Vekiĝo“ — Ŝumen, kaj E-grupo „Progreso“ — Magdeburg (GDR). Tamen poste estis subskribita kontrakto pri amika kunlaboro. Laŭ ĝi oni starigis oficialan kunlaboron, subtenatan de la Urba Konsilantaro en Ŝumen kaj Kulturligo de GDR — Magdeburg. Dum la pasintaj jaroj la kontrakto vere kontribuis por la reciproka interkonatiĝo ne nur de la esperantistoj, sed ankaŭ de ĉiuj homoj en ambaŭ urboj. Okaze de ĉiuj naciaj kaj internaciaj festotagoj kaj datrevenoj, estas interŝanĝataj mesaĝoj; estis aranĝataj ekspozicioj de fotomaterialoj, ĵurnaloj, bildkartoj k. a. En la nacilingva kaj E-gazetaro en ambaŭ urboj oni ofte informas pri la Esperanta, porpaca kaj porsocialisma agado de la esperantistaro. Tamen plej grava punkto certe estas la regula reciproka gastado de delegacioj ĉiun duan jaron. Magdeburgaj geamikoj jam estis en Ŝumen kaj partoprenis niajn solenaĵojn okaze de la 60-a, 70-a kaj 80-a datrevenoj de la fondiĝo de „Vekiĝo“; la Nacian Konferencon dediĉitan al la 1300-a datreveno de Bulgario; aranĝon okaze de la

100-a jubileo de Esperanto k. a. Ankaŭ ŝumenaj aktivuloj ĉeestis diversajn E-aranĝojn en Magdeburg.

En oktobro p. j., estis invitita ŝumena delegacio partopreni la celebron de la 40-a jubileo ekde la fondiĝo de GDR. Per la lokaj radiostacio kaj ĵurnalo ni informis pri nia multjara, nedisigebla kaj fruktodona amikeco kun la magdeburgaj esperantistoj. Nia dupersona delegacio, konsistanta el nia prezidanto Ĥristo Tonev kaj la estrarano pri la kulturagado d-ro Ljudmil Conov, estis tre varme bonvenigita ĉe la magdeburga stacidomo. Ili ambaŭ partoprenis la E-solenaĵon kaj aliajn renkontiĝojn. La prezidantino de „Progreso“ Edith Plumecke salutis tutkore la bulgarajn reprezentantojn kaj raportis pri la jubileo kaj pri la sindona agado de la lokaj esperantistoj. Ĥr. Tonev transdonis plej varmajn bondezirojn al la ĉeestantaj pli ol 40 magdeburgaj kaj aliaj esperantistoj kaj prezentis la specialan, jubilean salutleteron de la ŝumena esperantistaro kaj aliajn memoraĵojn. Dum la restado de la delegitaj okazis denove kortuŝa renkontiĝo kun la multjara subtenanto de Esperanto, bona amiko de Ŝumen, la unua sekretario de la Kulturligo — Magdeburg, Gartner. Por bulgaraj gastoj estis organizita ekskur-

so al la pitoreska montara kaj antikva urbo Wernigerode.

Post kiam la delegitoj revenis, dum kunveno de „Vekiĝo” ili ambaŭ raportis pri siaj impresoj kaj travivaĵoj. Estis multaj deman-

doj, al kiuj ili afable respondis. Tio sendube bone servas al la amikeco inter la esperantistoj el Bulgario kaj GDR.

Cvjatko TODOROV

Gasto el Dimitrovgrad

Antaŭ jaro nia societo ricevis leteron de ĉarma esperantistino Tatjana Iljutkina el sovetia urbo Dimitrovgrad — ĝemelurbo de nia Dimitrovgrad. Kun plezuro ni respondis al ŝi. Ni invitis nian samideaninon gasti ĉe nia societo kaj ŝi akceptis nian inviton.

La 20-a de aŭgusto p. j. ĝis 27-a de aŭgusto Tatjana Iljutkina kune kun alia sovetia familio, ankaŭ esperantistoj, estis gastoj de nia societo.

Estis vera festo por la esperantistoj de

nia societo esti inter sovetiaj esperantistoj. Ni kantis kune Esperantajn kantojn, faris amikan rondeton kaj gastis kune ĉe esperantistoj en Ĥaskovo.


Sovetiaj gastoj, akompanitaj de la prezidanto kaj la sekretario de nia societo, partoprenis la KEK-konferencon en Ruse.

La sovetiaj gastoj forveturis al sia lando forportante kun si multe da amikaj sentoj kaj multe da bulgara Esperanta etoso.

Minka KAZAKOVA

EL NIA LETERKESTO

SALUTO EL HISPANIO



*Estimata Redakcio,
Mia nomo estas Francisco Cabezas Jimenez, mi abonis la „BE”-n ekde la komenco de 1989. Mi tralegas ĝin kaj ĝuas ĝian enhavon. Laŭ mia opinio, Bulgario havas bonajn E-societojn.*

La fotografio, kiun mi kunsendas al vi montras kelkajn samideanojn el Portugalio kaj el Merida (Hispanio) en Romia Muzeo de Merida okaze de la unua Esperanto-renkontiĝo, kiu okazis en majo ĉi-jare. Ĝi

havis belegan etoson kaj neforgeseblajn travivaĵojn.

Ĝis nun, Merida ne havis esperantistojn kaj nature nek E-grupon.

Nia grupo ekzistas dank’ al la granda helpo de urbestro de Merida, kiu estas granda simpatianto de Esperanto. Li disponigis al ni la kulturdomon por okazigi E-kursojn. Krome la urbestro proponis al Hispana Esperanto-Federacio (HEF) aranĝi en 1992 la 52-an Hispanan Esperanto-Kongreson, kiun proponon HEF akceptis.

Mi profitas la okazon saluti ĉiujn redakcianojn kaj kunlaborantojn de via revuo.

*Amike kaj samideane
Francisco Cabezas,
Merida, Hispanio*

KONSTANTAJ MONTROFENESTROJ

La Esperantaj organizoj kaj ties membroj havas la devon aktive agadi por popularigo kaj disvastigo de la lingvo. La agadon oni povas dividi je tri partoj, kiuj formas unu tuton: propagando, instruado kaj praktika-do de Esperanto. Oni ĉiam komencas per propagando kaj informado. Unu el la plej facilaj, konstantaj kaj rezultodonaj propagandaj laboroj estas la aranĝado de montrofenestroj. Ni devas instali ilin en lokoj, kie la homamaso devas vole-nevole atendi aŭ alvenadi: trajnaj kaj aŭtobusaj stacidomoj kaj haltejoj, lernejoj, hoteloj, vojaĝoficejoj k. a.

En 1989 la varbado de esperantistoj al aŭtun-vintraj kursoj en Sofio komenciĝis pli frue, en aŭgusto. La Turisma Sekcio ĉe BEA utiligis por tiu celo la konstantan montrofenestron de la Centra E-Kulturdomo. Esperanta Klubo „Gajaj Migrantoj“ por la sama celo uzas la montrofenestron de E-societo „Konkordo“; komunumo Slatina, kiu situas en la strattunelo antaŭ Bulgara Telegrafa Agentejo kaj Poligrafia Kombinumo. En la lasta funkcias dudeko da redakcioj de gazetoj, ĵurnaloj kaj revuoj. La tria konstanta montrofenestro estas ĉe nia montodomo.

Niaj montrofenestroj popularigas la sukcesajn kaj utilajn por la movado praktikajn, konversaciajn E-kursojn por turistoj. En ili ni eksponis afiŝojn, revuojn, prospektojn, belajn poŝtkartojn kaj aliajn korespondajn. Ĉar en la montrofenestroj estas aktualaj adresoj kaj telefonoj, la alveno kaj telefonado de ekinterestitoj pravas, ke nia propagando kaj informado donas la atendatajn rezultojn.

NI DISTINGU ILIN!

Multaj gesamideanoj finance subtenas la movadon. En ĉiu numero de revuo „Esperanto“, organo de Universala Esperanto-Asocio, ni legas la nomojn de dekoj da personoj, kiuj donacis monon aŭ heredis sian havaĵon por la prospero de Esperanto.

En Bulgario ankaŭ estas similaj esperantistoj. En multaj landoj oni diversmaniere aprezas la grandan kaj abnegacian agadon de la homoj por Esperanto kaj ties movado. Ekzemple tiucele UEA ĉiujare aljuĝas specialan premion „Zamenhof“. Se BEA sekvos tiun vojon, la agado por Esperanto enkadre de la Asocio kaj ekster ĝi grave progresos.

PAROLANTA SALUTKARTO

En Francio estas komencita la vendado de salutkartoj, kiuj voĉe salutas iun. La karteto estas duobla, provizita per miniatura baterio kaj pezaz nur 20 gramojn. Kiam vi ĝin malfermas, aŭdas la voĉon de la homo, kiu vin salutas okaze de via naskiĝtago. Novjaro ktp. La mekanismo de surbendigo estas jena: oni premas koloran bendeton, sur kiu estas muntita surbendiga sistemo kaj dum ĉ. dek sekundoj estas direktata la bondeziro. La surbendigo povas esti forviŝata, por ke estu farata alia, aŭ povas esti aŭskultata multfoje.

Ĉu en Esperantio iu produktos similajn parolantajn E-salutkartojn?

Nikola NIKOLOV

REMEMORE PRI DOCENTO JOSIF PORTNOJ

Antaŭ certa tempo venis al ni trista informo: en u. Karaganda (Kazaĥa Soveta Socialisma Respubliko) forpasis neatendite docento Josif Lazareviĉ Portnoj.

Li estas konata al multaj bulgaraj esperantistoj. Kelkfoje li vizitis nian landon por kolektadi materialojn pri la historio de bulgara-sovetia kaj sovetia-bulgara amikeco.

Pri tiu temo li publikigis multajn artikolojn en bulgaraj kaj sovetiaj gazetoj kaj ĵurnaloj. Aparte li verkis du broŝurojn pri la amikecaj rilatoj inter la bulgaraj kaj sovetiaj sindikatoj, en kunaŭtoreco kun alia sciencisto, aperintaj en Sofia sindikata eldonejo „Profizdat“ kaj en Taŝkento (USSR).

Por la bulgara esperantistaro estas interesa kaj grava alia verko de Portnoj — „La kontribuo de la esperantistoj por la amikeco kun USSR“. Ĝin eldonis BEA en 1987. La enhavo de tiu libro estas tre valora, ĉar la aŭtoro faris grandegan esplorklaboron por trovi dokumentan materialon, laŭ kiu li preparis la manuskripton de la libro. Ne ekzistas alia simila esploro, kiel tiu farita de Portnoj. La libro estas eldonita en unu volumo kun du tradukoj de la teksto (en Esperanto kaj en la bulgara). Tiamaniere la libro prezentas interesan legaĵon kiel por la esperantistoj (nialandaj kaj en eksterlando), same tiel por la neesperantistaj hejmanoj aŭ konatuloj de esperantistoj, ĉar la temo pri la amikeco inter la bulgara kaj sovetia popoloj estas interesa por ĉiu bulgaro sendepende ĉu esperantisto aŭ ne.

Lige kun la funebra informo pri forpaso de nia amiko Josif Portnoj estas interese por la legantoj de „Bulgara Esperantisto“, ke ankaŭ alia verko de Portnoj troviĝas tutpreta por publikigo en la sama maniero: en unu volumo — Esperanta kaj bulgara tradukoj de la teksto. Tiu verko estas dediĉita al la vivo kaj scienca agado de malnova sovetia esperantisto akademiano Sergej Nikolaeviĉ Boev. Ĝi same estas riĉe dokumentita, sed estas facile legebla kiel novelo, ĉar la vivo de tiu sovetia esperantisto, intime ligita kun bulgaraj sciencistoj kaj esperantistoj, estas tro interesa. Verŝajne BEA povos en proksima periodo eldoni ĝin.

La Centra Estraro de BEA konsideris inviti docenton Portnoj ĉeesti la ĉi-jaran 42-an kongreson de BEA en u. Ŝumen, sed bedaŭrinde la morto malhelpis al nia amiko Portnoj de nove viziti la amindan por li Bulgarian...

Ni kliniĝu antaŭ la hela memoro de Josif Portnoj!

Nikola ALEKSIEV

BULGARIO

MARIJKA TANEVA (55-jara) — 8400 Karnobat, ul. „Stara planina“ 46 — kun ĉi pri interŝanĝo de E-tradukoj (popolkantoj, anekdotoj k. a.), kuirarto, floroj, kudrado, naturo.

PLAMEN PETROV (26-jara inĝeniero) — 9000 Varna, kv. Leviski, ul. „Dubrovnik“ bl. 6, vñ. A, ap. 21 — kun ĉi pri muziko, sporto, kino.

RUMJANA TRAJKOVA (15-jara) — 1289 Sofio, kv. „Mirovjane“ ul. „Iglia“ 3 — kun ĉi pri ĉt., precipe sporto, muziko kaj kino.

KOSTADIN PAEV (31-jara instruisto) — 2800 Sandanski, ĵ. k. „Spartak“ bl. 6, vñ. A, ap. 7 — kun ĉi pri slava historio kaj kulturo.

RUMJANA MITKOVA (27-jara ekonomiistino) — 9701 Ŝumen, ul. „Silistra“ 4, bl. 1, vñ. 2, ap. 46 — kun Bulgario, Pollando, Francio, Italio, Nederlando kaj Usono pri kino, floroj, moderna muziko, kolektas pm, pk, kalendarojn.

ĈEĤOSLOVAKIO

ZDENA ĈEĤMANOVÁ (47-jara) — CS—76001 Gottwaldov, Podhoří 515/13 — kun ĉi pri literaturo, arkitekturo, vojaĝoj, gastronomio.

KVĚTA POHANKOVÁ (36-jara inĝenierino) — CS—592 55 Bobrová, Dlouhý č. 39 — kun ĉi pri muziko kaj literaturo, kolektas bk de urboj.

KUBO

GILBERTO HERNANDEZ (23-jara) — Prolongacion de Marti, Edificio 2 apto 12, Santo Domingo V. C. Kubo 53000 — kun ĉi pri ĉt.

TOMASA GARCIA (26-jara) — Calle Colón N 22, Santo Domingo Villa Crla, Kubo 53000 — kun ĉi pri ĉt.

JUAN M. DIAZ DEL SOL (24-jara) — Calle Céspedes N 26 A, Santo Domingo Villa Clara, Kubo 53000 — kun ĉi pri ĉt.

POLLANDO

BOZENA SUDEK (20-jara) — PL—39—300 Mielec, woj. Rzeszów, ul. Kusocińskiego 19/78 — kun ĉi pri ĉt.

CEZARY KUBICKI (19-jara) — PL—96—100 Skieniewice, ul. W. Wasilewskiej 14/1 — kun bulgaraj esperantistoj pri ĉt.

VALDEMAR-GRZEGORZ LIPOVIĆ (23-jara) — PL—42235 Lełów, Tuvzyn 29 — kun bulgaraj esperantistoj pri turismo, literaturo.

JACEK WARDA (20-jara studento pri biologio) — PL—20—850 Lublin, ul. Radzyńska 20/46 — kun ĉi pri filozofio, poezio, vojaĝoj, vegetarismo.

GEORGO PAŃCZUK (45-jara) — PL—80—336 Gdansk, ul. Karpacka 6A/63 — kun ĉi pri ĉt, kolektas pk, pm.

ANNA ANTOLAK (23-jara) — Krakovo, ul. Chmielowskiego 2/33 — kun ĉi pri fotografado, turismo, natursciencoj, kolektas bk, turistmapojn.

PIOTR PAPROCKI (32-jara) — PL—93—171 Łódź, ul. Sieradzka 1 m 43 — kun bulgaraj esperantistoj pri muziko, literaturo, ŝako.

RUMANIO

MARIUS HORVATH (19-jara) — R—3400 Cluj-Napoca, Jud. Cluj, str. Tineretului 31 — kun gejunuloj el Eŭropo, precipe francaj, pri literaturo, sporto, ŝakludo esperante aŭ france.

SOVETUNIO

ĈESE BUTRIMAVIČIUTE (14-jara) — SU—232010 Vilnius, ul. Gelvonu 3—47, Litovio — kun ĉi pri ĉt; kolektas pm, bk, kalendarojn.

IRINA ZABORSKAJA (20-jara) — SU—246025 Gornel, ul. Borisa-Carikova 57—13, Belorusio — kun ĉi pri muziko, lingvoj, turismo.

VLADIMIR NIKITIN (44-jara min-inĝeniero) — SU—678626 Jakutskaja ASSR, Ustj-Majskij r-no, Solnečnij, ul. Stroitelej, 13/1, kv. 4 — kun ĉi pri psikohigieno, jogo, korpokulturo.

GLEB MALCEV (17-jara) — SU—326520 Cjurupinsk, Proletarskaja 71 — kun ĉi pri ĉt.

ANNELY NEIO (16-jara) — SU—202240 Kehra, Kooli 2^a — 60, Estonio — kun ĉi pri ĉt.

SILJA VOOLMAA (16-jara) — SU—202240 Kehra, p. k. 123, Estonio — kun ĉi pri ĉt.

FILATELO

БЪЛГАРИЯ BULGARIA



БЪЛГАРИЯ BULGARIA



БЪЛГАРИЯ BULGARIA



БЪЛГАРИЯ BULGARIA



Asocio „Komunikado“ en Bulgario emisiis la 20-an de oktobro 1989 serion de ses poŝtmarkoj kaj malgrandan folion je temo „Serpentoj“.

Valoroj kaj objektoj (en latinaj nomoj):

5 stotinkoj — *Erix jaculus turcicus*; 10 stotinkoj — *Elaphe l. longissima*; 25 stotinkoj — *Elaphe s. situla*; 30 stotinkoj — *Elaphe q. quatuorlineata*; 42 stotinkoj — *Telescopus f. fallax*; 60 stotinkoj — *Coluber r. rubriceps*.

Teknikaj donitaĵoj:


Formato: 29 × 39 mm. (horizontale)

Tekniko: ofseta presado

Eldonkvanto: 270 000 kompletaj serioj kaj 250 000 malgrandaj folioj.

Aŭtoro de la projekto estas pentristo Ljudmil Ĉeflarov.

Draguško PETROV



Distroj

LA PREMIOJ

Pro la ĝusta solvo de Anagram-enigmo, publikigita en n-ro 10/89 de „BE”, libropremion gajnas Gergana Ruseva el Sofio. Ŝi ricevas libron „Mia verda pado” de Ĥr. Gorov.


La solvo estas: **Tapiro — Pirato**

Alian libropremion gajnas Asen Krasimirov el Sofio — pro la ĝusta solvo de Diagonaloj. Ni sendis al li libron „Kantoj de motoroj” de N. Vapcarov.


Jen la solvo:

Dekstren: 1. Berno. 2. Dorso. 3. Koalo.
4. Klaso. 5. Gurdo. 6. Verda. 7. Po. 9. Bo.
Maldekstren: 2. De. 3. Korbo. 4. Korno.
5. Glaso. 6. Vualo. 7. Perso. 8. Bordo. 10. Do.

Jerem.



DIAGONALOJ



Dekstren: 1. Versaĵo de L. L. Zamenhof. 2. Ekstera signo de ĝentileco, kiun oni esprimas per vortoj aŭ movoj al renkontata persono. 3. Vertikala arkitektura elemento. 4. Profitodona riĉaĵo. 5. Plene kvietigita manĝbezono. 6. Prepozicio. 8. Nuanco de voĉo aŭ koloro. 10. Araba lando. 11. Ĉiu aparta peco de metalmonero. 12. Natura fluanta akvomasaĵo. 13. Speco de ludo, konsistanta el 28 tabuletoj kun punktoj. 14. Objekto, kiun oni ĵetas aŭ elektas, kaj laŭ kies hazarda pozicio aŭ indiko oni ion decidas. 15. Subjunktio. 17. Plej valora metalo.

Maldekstren: 2. Esperantista organizaĵo fondita de Eŭgeno Lanti. 3. Malplenaĵo. 4. Supera oficira rango. 5. Vazeto, en kiu oni metas natrian kloridon por tablo uzado. 6. Granda dika kapuĉhava mantelo. 7. Lerto akirita per praktika ripetado kaj longa kutimo. 9. Muzika signo. 11. Persona pronomo. 12. Longa virina vesto. 13. Monunujo de balkana lando. 14. Urbo en Belgio. 15. Jarsezono. 16. Skribajo, per kiu oni komunikas ion al alia persono. 18. Frakcio.

Cvetan MANOJLOV

— Ne klopodu plue. Kiam mi kriis „Helpon!” mi nur volis vidi kiel progresas la kampanjo „Esperanto inter montgrimantoj”.

Noto de la Redakcio: Viajn solvojn ni atendas ĝis la 15-a de marto 1990. La rezultoj estos publikigitaj en n-ro 6/90 de „BE”.

INTER SCIENCO

KAJ FIKCIO

Lastatempe abundas informoj pri diversaj eksterordinaraj kaj neklari-geblaj fenomenoj: Neidentigitaj Flugantaj Objektoj (NIFO-j), „Poltergeist“ (bruega fantomo), nekutimaj kuracmetodoj ktp. Iuj senrezerve kredas, aliaj skeptikemas, sed... ĉiuj interesiĝas!

Kompreneble, aperadas ankaŭ multaj hipotezoj. Ĉar ni publikigis eltiraĵojn el la libro „Vanga“ de Krasimira Stojanova, ni ŝuldas al la gelegantoj de „Bulgara Esperantisto“ almenaŭ unu provon pri klarigo de tiu fenomeno. Pro tio ni prezentas al vi la iom provokan hipotezon de la sovetia supera scienca kunlaboranto, d-ro de teknikaj sciencoj Valentin Fomenko. Detala artikolo pri tio aperis en gazeto „Pogled“ (Rigardo) de la 6.11.1989.

Valentin Fomenko gastis antaŭ nelonge en Bulgario. Ĉefa celo de lia vizito estis vilaĝo Dibiĉ (proksime al Ŝumen), kie observeblas la fenomeno „Poltergeist“. Dum sia restado en nia lando li renkontiĝis kun diversaj homoj, li vizitis ankaŭ Vanga-n.

Laŭ Fomenko ĉiuj eksterordinaraj fenomenoj estas ligitaj inter si. Lia hipotezo samtempe klarigas kaj NIFO-jn, kaj „Poltergeist“, kaj telepation, kaj aliajn malordinaraĵojn en la naturo kaj homo. Laŭ V. Fomenko, antaŭ pluraj jarmiloj alvenis artefarita intelekto, kiun li nomas „La Almigrinto“. Supozeble tio estas sondo el superdura materialo, bonege rezistanta al ĉiaj eksteraĵoj influoj, kiun kreis alia biologia civilizo, ekzistinta aŭ ekzistanta ie en la Universo.

Pro sia neimageble granda pezo la „Almigrinto“ dronis ĝis la centro de la Tero. De tie ĝi kolektadas informojn. Ĝi observis civilizojn, kiuj pereis; nun ĝi observas nian civilizon. En la ĉirkaŭtera spaco ĝi loĝigis elektitajn reprezentantojn de la homaro — el pasintaj kaj el nunaj periodoj. Ili havas diversajn taskojn; krome, kaze de katastrofo ili pretas loĝigi la Teron.

La NIFO-j kaj la fenomenoj „Poltergeist“ estas gvidataj de la „Almigrinto“ laŭ principo de marionetoj — ĉiu parteto de ili estas ligita kun nevidebla „fadeno“.

Iuj homoj kapablas certgrade uzi la energion de tiuj „fadenoj“. Ankaŭ la „Fenomeno Vanga“ konsistas en tio, ke ŝi ricevas informojn de la „Almigrinto“.

Ĉu ni nepre devas kredi al la hipotezo de Valentin Fomenko? Li ne postulas tion de ni: „Sufiĉas, se la homaro pripensus kaj korektus sian konduton. Apud ni ekzistas maŝina civilizo, kiu scias ĉion pri ni. Ĝi eble estas nia amiko!“

